

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Stefan MacGill

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Aurora Bute

Renato Corsetti

Nina Danylyuk

Johan Derks

Magdaléna Feifíčová

Mariana Gencheva

Ronald Glossop

Mireille Grosjean

Sylvia Hämäläinen

Marija Jerković

Dennis E. Keefe

Zsófia Kóródy

Katalin Kováts

Stefan MacGill

Luigia Oberrauch Madella

Raita Pyhälä

Franz-Georg Rössler

Josef Vojáček



ilei

ENHAVO

Jozefo NÉMETH: <i>Enkonduko</i>	3
Stefan MACGILL: <i>Pri peso de 45 monatoj</i>	4
Renato CORSETTI: <i>Ĉu Zamenhof estis freneza?</i>	6
Johan DERKS: <i>Kiom internacia estas via vorto?</i>	12
Dennis KEEFE: <i>BEK-kurso kaj la tradicia Cseh-kurso</i>	16
Franz-Georg RÖSSLER: <i>Iam instruisto – ĉiam instruisto</i>	20
Penelope VOS: <i>Saluton! Talking to the Whole Wide World</i> (recenzo de SMG)	22
<i>El la landoj kaj sekcioj (CZ, FI, IT, CA/US, HR, RO, UA)</i>	24
Mireille GROSJEAN: <i>Ekzamensesio en Senegalo</i>	31
Mariana GENCHEVA: <i>Inter la historio kaj la estonteco</i>	32
Raita PYHÄLÄ: <i>La Panteono</i>	33
Magdaléna FEIFIČOVÁ (Fejfi): <i>Alparolas vin la nova vicsekretariino de ILEI</i>	34
<i>La 46-a Konferenco de ILEI en 2013 (pliaj informoj pri la programo)</i>	36
PEKA prezento: <i>PEdagogia KAlendaro – nova servo de ILEI</i>	38
<i>Informoj pri ILEI kaj nia redakcio</i>	40
<i>Adresaro de niaj sekciestroj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj</i>	41

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Stefan MACGILL, Pannónia u 30.1.6, HU-1136 Budapest, Hungario.

<ilei.prezidanto@gmail.com>. Tel. fiksa (+36 1) 349-5207.

Kunordigo, partneroj, regularoj, kurso 125, Juna amiko.

Sekretario: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio.

<ilei.sekretario@gmail.com> por sekretariaj aferoj, <radojica.petrovic.rs@gmail.com> alie. Tel. fiksa (+381) 32 371053. Sekretariaj taskoj, edukprojektoj kaj konferencoj.

Estrarano pri financoj: Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. fiksa (+ 510) 653 0998.

Financaj kaj kasistaj aferoj.

Vicprez.: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. <zsofia.korody@esperanto.de>. Tel./fakso fiksaj: (+49) 5521-5983. LKK de la 46a konferenco, E-centroj, instrukapbligado, ekzamenoj.

Vicsekr.: Magdaléna FEIFIČOVÁ (Fejfi), Bernolákova 25/5, SK-010 01 Žilina, Slovakio.

<ilei.officejo@gmail.com>. Membro-administrado, rilatoj kun aliaj fakaj asocioj.

Estrarano: GONG Xiaofeng (Arko), School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>.

Azia agado, universitata agado.

Estrarano: Bharat GHIMIRE, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, Nepalo.

<nespa.1990@gmail.com>. Tel. (+1) 620 9877. Eksteraj rilatoj, universitata agado.

Estrarano: Enikő ZENGŐ SEREGHY, Dózsa u.14. 2/8, HU-4400 Nyíregyháza, Hungario.

<enimyster@gmail.com>. Tel. portebla: (+ 36) 203234365.

Instrukapbligo, ekzamenoj, kalendaro, membro-varbado.

Estrarano: Penny VOS, Aŭstralio <penivos@yahoo.com>.

Landa kaj lerneja agado, eksteraj rilatoj, instrumaterialoj, reta kontaktado.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford; AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Vera Barandovská-Frank, Germanio,
Universität Paderborn; AIS²

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università degli
Studi di Roma „La Sapienza”; AdE¹

Probhal Dasgupta, Barato, LRU, Indian
Statistical Institute, Kolkata; AdE¹

Michel Duc Goinaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Wim Jansen, Nederlando, Universiteit
van Amsterdam

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama Mickiewicza
w Poznaniu; AdE¹

Maria Majerczak, Pollando, Uniwer-
sytet Jagielloński w Krakowie

Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia
Universitato de Paranao; AdE¹

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия
Сельскохозяйственного
Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet
u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

Sekretario: Aida Čižikaitė, Litovio

¹ AdE – Akademio de Esperanto

² AIS – Akademio Internacia de la
Sciencoj, San-Marino

Titolpaĝe: *la 46a Konferenco atendas
vin: supre: partoprenantoj de SALO
2011; malsupre: Goslar, unu el niaj
ekskursceloj* (p.36)

Dorskovrile supre: *Comenius-renkontiĝo
en Bulgario* (p.32); malsupre:
E-simpozio en Rumanio (p.29)

Enkonduko

Karaj Legantoj,

„Mortis la reĝo! Vivu la reĝo!” –
tekstus la proklamo... Feliĉe, ni vivas
ne en regno aŭ monarkio, kaj ni havas
ne reĝon, sed Prezidanton, kiu fartas pli
kaj pli bone, ĉar li povos forlasi sian
pezan postenon fine de marto. (vd. p.4).
Plia bonŝanco – almenaŭ el la vid-
punkto de IPR – ke li akceptis mian
inviton membriĝi en la redakta komi-
tato de nia revuo. Mi ja transprenis de li
la redaktoran taskon fine de 1994, sed
vi malfacile trovus postan numeron, kie
lia nomo ne aperas titolpaĝe inter la
kunlaborantoj. Liaj redaktoroj spertoj
garantias la daŭran bonan nivelon de
IPR el profesia vidpunkto.

La fakan nivelon de la nuna numero
bone reprezentas la altnivelaj artikoloj
de Renato CORSETTI, Johan DERKS kaj
Dennis KEEFE. Legante la instruistajn
rememorojn de Franz-Georg RÖSSLER,
mi rememoris ankaŭ la komencajn kvin
jarojn de mia redaktora laboro, kiam li
helpis nin per provlegado. Krom la
fakaj artikoloj vi trovos en la numero
multajn gravajn informojn kaj rapor-
tojn, sed partojn de ili – manke de
spaco – ni devis mallongigi. Kompen-
se, ni aperigos tiujn raportojn en la ori-
ginala amplekso, kun foto(j), komenco-
paĝe de www.ilei.info, en la rubriko
„Novaĵoj”. Bonan legadon!

Josefo NÉMETH,
redaktoro

Pri peso de 45 monatoj

Kutime la prezidanto prenas la taskon liveri novjaran saluton en la unua numero de IPR por la freŝa jaro. Ĉi-jare tamen la saluto havas apartan karakteron, ĉar necesas komuniki, ke via nuna prezidanto forlasos tiun postenon en la 31a de marto, 2013. La elekto-komisiono do laboras arigi novajn kandidatojn, ĉu por baldaŭa ekoficiĝo, ĉu ekde la julia konferenco.



Motivoj por tiu decido, krom la ĝenerale troa pezo de la tasko, estas:

- Savi nian kvardekjariĝantan revuon *Juna amiko* de pereco per rapida aperigo de du sinsekvaj numeroj: 2012-3 marte kaj la jubilea antologia numero 2013-1 jam en majo. Tio rekaptus la akuratecon. Tamen, ni daŭre kaj eterne serĉas novan redaktoron kaj varban direktoron.
- Partopreni adekvate kaj energie en la detalado de la *Strategia Vizio* ĉe UEA cele al konkreta tutmovada *Laborplano por la periodo 2013-2017*, kun emfazo sur la edukaj projektoj. Tiu kunlaboro jam okazas, sed devas pluri pli intense.
- Revivigi la verkadon por *Kurso e125* – eĉ ne unu frazo estis aldonebla depost decembro 2011. Sed nun ni havas novan desegniston – 40 bildoj ricevitaj, la pretigado/verkado reprenas ian ritmon.

Tempo do por ririgardi al atingoj de mia proks. 1370-taga prezida periodo:

- Tri sukcesaj simpozioj, du konferencoj kun pli ol cent partoprenantoj.
- Plurjara subteno de aŭ pere de ILEI por instruista trejnado (UAM, RITE...) kaj restarigo de la propraj trejnkursoj.
- Starigo de multlingva retejo por ILEI por turni nin al la ekstera eduka mondo. Samcele pretigo de dulingvaj varbiloj pri la eduka valoro de Esperanto. Por akceli la terenon, ni unuafoje en 2012 nomumis estraranon por prizorgi eksterajn rilatojn.
- Intensigo kaj vastigo de regiona agado – tra Latinameriko sekve de la seminario kaj konferenco en Matanzas, tra Azio prepare al Kunmingo kaj sekve de ĝi, kun sukcesa 3a ISOA ĵus okazinta en Koreio.

- Sistema pledado ĉe UEA por altigo de la rimedoj por eduka laboro (ILEI disponis en 2009 pri €3000, €4200 en 2012 kaj €6200 en 2013).
- *Juna amiko* portita tra ĉiuj obstakloj al sia kvardekjariĝo.
- Reta voĉdonado enkondukita por nia Komitato – 34 decidoj aŭ aproboj.
- La estraro okazigis skajpajn kunsidojn kaj retajn voĉdonojn.
- La liga retejo ĉiusemajne tra la tuta periodo nutrita per freŝaj novaĵoj aŭ aldonaĵoj: buĝetoj, rezultoj, protokoloj regule kaj akurate afiŝitaj por liga travideblo, partneroj kreskis de du (neaktivaj) al 14 (aktivaj); sekcio pri historio starigita por malnovaj skanitaj dokumentoj kaj malkovroj pri nia frua historio (1949-1966).
- Kontinua trakto de plibonigoj kaj precizigoj en la Statuto kaj Interna Regularo – 53 modifoj akceptitaj. Daŭrigenda tasko, sed laŭproverbe ‘komenco bona, laboro duona.’
- Eldono kune kun *e@i* de *Detala Gramatiko de Esperanto* kaj reldono de la populara *Manlibro pri la Instruado de Esperanto*.
- Tuj post mandat-komenco, riparado kaj pozitivigo de rilatoj inter ILEI kaj *edukado.net*, same transformita sinteno al la KER-ekzamenoj.
- Starigo de kunlaboraj rilatoj kaj komunaj projektoj kun IFEF, AIS, EEU, ALIE, AKEL, Springboard, Kulturcentro Grésillon, Studumo Bydgoszcz, la Arta Kolegio en Kunmingo, Universitato Adam Mickiewicz, (kun IC Herzberg, UEA, TEJO, FIPLV, *e@i* kaj *lernu.net* jam ekzistis kunlaboro). Pluraj pli atendas pritrakton.
- Funkciantaj sekcioj kreskis de ĉ. 28 ĝis 34; se enkalkuli reprezentantojn kaj kontaktpersonojn, de 42 ĝis 52. Membraro kreskis de 674 fine de 2009 ĝis ĉ.730 fine de 2012.

Mi ripetas miajn dankojn al la antaŭaj estraranoj kaj aldonas samon por la nunaj – la atingoj fontis el teamaj laboro kaj kunlaboro.

Mankoj ja ne mankas, sed ja mankas spaco detali ilin; ni konscias pri ili kaj en la sekvaj jaroj ILEI, kunlabore kun UEA, provos ŝtopi tiujn mankojn kaj brave eniri novajn terenojn, por ke ambaŭ organizoj pli trafte kaj moderne plenumu siajn ekzistokialajn celojn.

Stefan MACGILL

Ĉu Zamenhof estis freneza?

Pri instruado de Esperanto kaj pri la nova „lernu”.

de Renato CORSETTI (Università degli Studi di Roma „La Sapienza”, Italio)

1. Enkonduke

Foje oni bezonas infanojn, por diri, ke la reĝo estas nuda. Ion tian oni devas diri rilate al la instru-metodoj pri lingvoj. Neniu profesoro kaj neniu lingvoinstruisto kuraĝas diri tion al vi. Eĉ male oni insistas pri tio, ke estas mirakle efike lerni unue la verbojn kaj poste la adjektivojn, kaj ke la sugestopedia metodo lernigas lingvojn dum vi dormas. Aliflanke, se ili pravus, nun oni lernas lingvojn pli facile ol oni lernis ilin en la tempo de la praaj egiptoj. Sed, bedaŭrinde, nun oni lernas ilin same malfacile. Certe oni havas komputilojn, kiuj povas prezenti al vi la materialon en tre kolora formo, kiam ajn vi deziras tion. Certe oni havas librojn kaj diskojn. Sed tiuj estas nur supraĵaj aspektoj. Antikvaj egiptoj kutimis sendi sep-jarajn infanojn loĝi dum sep jaroj en la lando, kies lingvon ili devis en la posta vivo interpreti. Tio nuntempe havas la nomon „*full immersion*” (plena mergiĝo) aŭ simile, sed esence temas pri la sama afero. Lerni lingvojn postulas multan tempon kaj multan laboron nun kiel ĉiam antaŭe.



Alia afero, kiun nur infano povus diri al vi, estas, ke ne estas vero, ke ĉiuj lingvoj estas samaj, kiam temas pri lernado. Ĉiu el ili havas siajn facilajojn kaj malfacilaĵojn. Pri la angla ĉiuj scias, ke la manko de deklinacioj estas granda facilajo por eŭropaj infanoj kutimiĝintaj lukti kontraŭ la latina, dum la elparolo estas granda malfacilaĵo. Sed la samo validas por ĉiu lingvo. La latina „*consecutio temporum*”, uzo de la tempoj en subordigitaj frazoj, estas io, kion malmultaj en la antikva Romo mem kapablis finlerni, la dekoj da formoj de la pluralo en la araba, la tonoj en la ĉina ktp. estas apartaj malfacilaĵoj de apartaj lingvoj. Do, ĉiu lingvo devas esti lernata siamaniere, kaj oni devas konsideri evidente ankaŭ la lingvon de la lernanto. Ne estas same instrui la hebrean al mi, itallingvano, aŭ al arabo, parolanta simil-strukturan lingvon.

2. Ĉu Esperanto estas facila aŭ malfacila?

Ni ĉiuj scias, ke E-o estas facila. Ree, ne kedu al la fakaj lingvistoj, kiuj provas diri, ke ĉiuj lingvoj estas same malfacilaj. Ili ne scias, pri kio ili parolas. E-o estas pli facila ol aliaj lingvoj, ĉefe ĉar ĝi ne havas esceptojn kaj la reguloj estas malmultaj kaj surface facilaj. Alivorte tiuj, kiuj konscie provas enkonduki malregulaĵojn en E-on kaj provas igi ĝin pli eŭropa, devus esti konsiderataj krimuloj kaj juĝataj de internacia kortumo pri lingvaj rajtoj. Por neeŭropanoj estas problemoj pri la vortostoko, tio estas vera, kaj estas pliaj problemoj pri la eŭropeca funkciado de pluraj aspektoj de la gramatiko, sed Esperanto restas pli facila ol aliaj eŭropaj lingvoj.

Sed je la pli profunda nivelo Esperanto ne estas facila kaj ĝi ne estas komprenebla, se oni ne havas apartan senton pri lingvoj aŭ, se oni ne havis tre bonan instruiston. Esperanto ne funkcias kiel la franca aŭ la germana, kvankam surface ĝi ŝajnas tia. Do, evidente ĝiaj malfacilaĵoj nestas en tiu struktura malsameco kaj tion oni devas klarigi al la lernantoj.

Kial, ekzemple, la Universala Vortaro, parto de la netuŝebla Fundamento, ne enhavas kompletajn vortojn sed nur radikojn? Ĉu pro tio, ke Zamenhof estis freneza aŭ ŝatis ŝerci? Vidu, ekzemple, peceton de la litero A:

abat' *abbé* | *abbot* | *Abt* | *аббатъ* | *opat.*

abel' *abeille* | *bee* | *Biene* | *пчела* | *pszczola.*

abi' *sapin* | *fir* | *Tanne* | *ель* | *jodla.*

abomen' *abomination* | *abomination* | *Abscheu* | *отвращение* | *odraza.*

abon' *abonner* | *subscribe* | *abonniren* | *подписываться* | *prenumerować.*

ablativ' *ablatif* | *ablative* | *Ablativ* | *творительный падежъ* | *narzędnik.*

abrikot' *abricot* | *apricot* | *Aprikose* | *абрикось* | *morela.*

absces' *abcès* | *abscess* | *Geschwür, Eiterbeule* | *нарывъ* | *wrząd.*

absint' *absinthe* | *absinthium* | *Wermuth* | *полынь* | *piołunkówka.*

acer' *érable* | *maple* | *Ahorn* | *кленъ* | *klon.*

aĉet' *acheter* | *buy* | *kaufen* | *покупать* | *kupować.*

sub'aĉet' *corrompre* | *corrupt* | *bestechen* | *подкупать* | *przekupywać.*

Kial ĝi prezentas nur radikojn? Ĝi faras tion, ĉar E-o ne konsistas el vortoj sed el radikoj. Tiun parton de la Fundamento oni tuj kaj abunde forgesis kaj tuŝis. Prezenti vortaron kun radikoj kaj ne kun vortoj ŝajnis al niaj unuaj vortaristoj io neebla. Finfine oni faras tion nenie en Eŭropo. Tiel tiuj vortaristoj kontribuis al „malinstruado” de E-o aŭ al instruado de „Malesperanto”.

Ĝis hodiaŭ, kun apenaŭaj esceptoj, ĉiuj vortaroj havas vortojn, ne radikojn, kvankam ili provas diversmaniere prezenti ankaŭ la variaĵojn kun la sama radiko sed kun alia finaĵo. Ekzemple la plej bona E-vortaro en la nuna mondo, alivorte la vortaro Esperanta-angla de John WELLS¹, provas prezenti sub la kapvorto ankaŭ la vortojn kun aliaj finaĵoj. Ekemple ni prenu la kapvorton „**impulso**”. Ĝi diras: „impulse, impetus; **-i** impel”. Evidente tiu estas ekzemplo de provo ne instrui Esperanton kiel oni instruas la francan. Sed ni estas ankoraŭ malproksimaj de insistado pri tio, ke E-o funkcias per radikoj.

3. Ĉu Zamenhof estis freneza?

Ni jam demandis nin, ĉu Zamenhof aranĝis la Universalan Vortaron en tiu maniero, ĉar li estis freneza?

La respondo laŭ mi estas laŭta „ne!” Li sciis, kion li faras. Finfine li estis la kreanto de la lingvo. Ni lasu lin mem paroli: „Mi aranĝis plenan dismembriĝon de la ideoj en memstarajn vortojn... [ekzemplo: frat-in-o = ina frat-o]... Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alikonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne traleginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), – li eĉ ne supozas, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo.”²

Li sciis, kion li faras. Li volis fari lingvon en kiu vi rajtas uzi la radikon „tabl-” kiel radikon de la vortoj „tabl-o”, „tabl-a”, „tabl-i”, kaj „manĝ-” kiel parton de „manĝ-i”, „manĝ-o” kaj „manĝ-a”, por ne paroli „tabl-manĝ-a” kaj „manĝ-tabl-a”.

Kiu klarigas al la lernantoj ke E-o funkcias tiel? Kiu klarigas la signifon de la unuaj versoj de la *Siberia lulkanto* de Julio BAGHY:

¹ Wells, J. C. (1969) *Concise Esperanto and English Dictionary*, Sevenoaks: Teach Yourself Books - Hodder and Stoughton

² Zamenhof, Lazaro Ludoviko, *Unua libro de la lingvo Esperanto* en Fundamenta Krestomatio, 12-a eldono, paĝo 248.

*Hirte flirte flugas haroj,
siblas vintra vent'...
Morde torde ŝiras koron
larmoj kaj la sent'...
Kant' patrina plore sonas,
dormas filo en lulil'...
Noktripozon por li donas
song' infana en trankvil'...*

aŭ tiujn de lia kolego Kálmán KALOCSAY en *Somernokto*:

*Kiel jubile ĉiuj griloj
Per sia ĉirpo frenezumas!
Inter la herboj la lampiroj
Diskrete, sole por si, lumas.*

Se oni ne komprenas tion, oni estos devigata sekvi la spurojn de tiuj membroj de la Lingva Komitato, kiuj en la unua Oficiala Aldono al la Universala Vortaro enkondukis la radikon „tragedi-“ kaj en la tria Aldono la radikon „tragik-“, ne komprenante ke en Esperanto „tragedia“ jam sufiĉas.³

4. La „facila vorto“ de la lerno-programo „lernu.net“

Ĉiuj ĉi tiuj ĝisnunaj teoriaj konsideroj portas nin al praktika apliko de ili al iu tre modesta laboro: klarigi al la lernantoj de E-o pere de la programo „lernu.net“ proksimume 1 000 facilajn vortojn. La elektado de la vortoj okazis per iom banala kunmeto de la unuaj 500 radikoj el la listo de la facilaj vortoj de *Kontakto*, kun la unuaj 500 radikoj de la oftecolisto de la parolata E-o de Zlatko TIŠLJAR, kun la unuaj 500 radikoj de oftecolisto kreita de Erin PIATESKI surbaze de literaturaj tekstoj kaj kun la vortoj uzataj en la rakonto, kiu estos la instru-rakonto uzota de la nova „lernu.net“.

Nun, klarigi tiujn radikojn aŭ vortojn al lernantoj, kiuj estas komencantoj, ne estas io facila el la teoria vidpunkto. La unua demando estis ĉu klarigi vortojn aŭ radikojn? La decido estis facila. Ni klarigu E-on, kia ĝi estas. Sed la dua demando estis, kiel klarigi la kontraŭdiron pri tio, ke ĉiu radiko

³ Verdire en la unua Aldono, oni ankaŭ enkondukis la kvazaŭradikon „tragi-“ por formi la vorton „tragikomedio“.

havas signifon substantivan, adjektivan aŭ verban enkonstruitan en la radikon mem. Do, „martel-” esence estas „martel-o” (aĵo por enbati najlojn), dum „manĝ-” esence estas „movi la dentojn kaj engluti manĝaĵon”, alivorte „manĝ-i”. Tion oni klarigas per aldono de la koncepto „baza vorto”, kiu devus instrui, ke ĉiu radiko en E-o estas rekte kunligita kun vorto kaj surbaze de tiu unua signifo transformiĝas al aliaj signifoj per aldono de aliaj finaĵoj.

La posta difino rilatas al tiu baza vorto, sed la ekzemploj provas montri ĉiujn signifojn de la radiko kunmetita kun la aliaj finaĵoj: -a, -o, -i, -e. La tradukoj tradukas la bazan vorton komence, sed poste ĉiujn aliajn eblojn.

Ni donu konkretajn ekzemplojn:

1. „abomeno”

radiko: abomen-

baza vorto: **abomen-o**

difino: Malamego pro fizike aŭ morale tre malplaĉaj ecoj.

Ekzemploj: Ja vi scias, ke mi abomenas araneojn. Ne necesas senti al li abomenon. Via agado estis abomena. Ĉiu abomenaĵo trovas sian adoranton. Ne faru tiel, se vi ne volas abomenigi vin de aliaj. Nun mi trovas tiun projekton abomeninda.

angle: loathing; **-i** to loathe; **-a** loathsome.

ĉine: 憎恶，可恶的事.

france: (une) détestation, abomination; **-i** = détester, abominer; **-a** = détestable, abominable.

germane: Abscheu, Ekel; **-i** = Abscheu, Ekel empfinden; **-a** = abscheulich, ekelhaft.

hispane: abominación, repugnancia; **-i** = abominar, detestar; **-a** = abominable, detestable, repugnante.

hungare: utálat, undor; **-i** = utál, undorodik; **-a** = utálatos, undorító.

portugale: repugnância, asco, horror, abominação; **-i** abominar, detestar, sentir repugnância de; **-a** abominável, detestável, repugnante.

ruse: ненависть, отвращение из-за физических или моральных качеств (свойств) объекта; **-i** = испытывать отвращение, относиться с отвращением; **-a** = отвратительный, мерзкий, гадкий, противный.

2. „-aĉ”

difino: montras malaltan kvaliton.

Ekzemploj: Malriĉuloj loĝas en domaĉoj. Riĉuloj malŝatas la populaĉon. Per aĉaj iloj ne estas eble labori. Ne ĝenu min per tiaj aĉaĵoj.

angle: awful; **-e** awfully; **-i** to be awful.

ĉine: 表示不好的, 差劲的后缀.

france: **-a** = sans valeur, moche, piètre, méprisable; correspond au suffixe -ace dans populace, -asse dans vinasse, fadasse.

germane: Die Nachsilbe wirkt herabsetzend, drückt schlechte Qualität aus: hundo – Hund, hundaĉo – Köter, romano – ein Roman, romanaĉo – ein Schundroman.

hispane: de baja calidad o valor.

hungare: silányító jelentésű képző; aĉa – vacak; domaĉo – kalyiba, ĉevalaĉo - gebe; molaĉa – puhány; skribaĉi – firkál, kantaĉi - kornyikál.

portugale: de baixa qualidade ou valor (física ou intelectualmente), desprezível.

ruse: суффикс, обозначающий низкое качество, никчёмность, непригодность, малоценность, выражающий презрение, пренебрежение, неуважение. Например: ĉevalaĉo - лошадёнка, кляча, libraĉo – книжонка, ĝidetaĉi - ухмыляться, кривиться в улыбке.

3. „aĉeti”

radiko: aĉet-

baza vorto: **aĉet-i**

difino: ekhavi per pago.

Ekzemploj: Li ĵus aĉetis novan domon per multe da mono. Malhonestuloj subaĉetis registarajn oficistojn. Ĉe kelkaj antikvaj popoloj la sklavo povis sin elaĉeti. Potenca ekonomia grupo foraĉetis la tutan haveblan sukeron por vendi ĝin je pli alta prezo.

angle: to buy; **-o** a purchase; **-a** buying, purchasing (adj.)

ĉine: 买

france: acheter, obtenir contre argent; **-o** = achat, emplette

germane: kaufen; **-o** = der (Ein)kauf

hispane: comprar

hungare: vesz, vásárol; -o = vétel, vásár, vásárlás

portugale: comprar; sub- subornar; el- redimir, resgatar; for- açambarcar

ruse: купить; o = покупка; -a = покупной (связанный с покупкой),
покупательный (aĉeta prezo - покупная цена; закупочная цена).

Temas pri modesta laboro, kiu eble utilis por doni al la komencantoj ĉe „lernu” la ideon, ke E-o funkcias per radikoj, kaj ke tiu estas la malfacilaĵo, se vi ankoraŭ ne apartenas al lingvogrupo, kiu funkcias same.

Kiom internacia estas via vorto?

Kvantigo de la 15a regulo

de *Johan DERKS* (Serbio)



La koncepto „internacia vorto” neniam trovis ajnan ĝenerale akceptitan difinon. La priskriboj povas enhavi malprecizan kvant-indikan terminon kiaj *pluraj* aŭ *la plimulto*, eĉ la signifo povas dependi de la lingvo el kies vidpunkto la priskribanto volas difini ĝin. Tial, ŝajnas neeble fari eventualan sciencan esploron pri la situacioj kaj kondiĉoj kial iuj vortoj estas internaciaj kaj aliaj ne.

La interaga programo „Kiom internacia estas via vorto?”, eldonita de J.H. Derks en la retejo www.esp-evoluo.org, provas kompensi ĉi tiun preterlasecon proponante naŭ kvantajn difinojn kiujn oni povas prezenti en tabelo kun du enirvojoj. La unua enirvojo permesas elekti inter tri metodoj, t.e. simple nombrante la lingvojn kiuj enprenis la koncernan vorton, pesante ilin laŭ iliaj nombroj de denaskaj parolantoj aŭ difinante por la koncernataj lingvoj po parametro, nomata „virtuala akademia valoro”, kio kunportas akcepti Rawlsecan⁴ difinon de lingvovaloro.

La dua enirvojo permesas al la uzanto elekti lingvaron por la statistika kalkulo bezonata cele determini la „gradon de internacieco”, surbaze de la

⁴ Vidu http://eo.wikipedia.org/wiki/John_Rawls

decido de la uzanto pri tio, ĉu la traduko de la koncerna vorto sufiĉe similas la originalon aŭ ne. Unu lingvaro estas la „fontolingvoj” de E-o, kio kondukas al rezulto ĉu la vorto aŭtomate apartenas al E-o aŭ ne laŭ ortodoksa interpreto de la „dekkvina regulo” en la Esperanta gramatiko, alia estas 28 gravaj eŭropaj lingvoj, la tria 51 gravaj lingvoj tutmonde. La ideo proponi tiujn naŭ difinojn nur celas, laŭ la programinto, progresigi komprenon de kaj esplorado pri la fenomeno „internaciaj vortoj” kaj helpi al esperantistoj apliki la dekkvinan regulon en moderna maniero.

Laŭ la Wikipedia artikolo pri lingvistiko, *internaciismo* aŭ *internacia vorto* estas vorto kiu enpreniĝis en plurajn lingvojn kun la sama aŭ almenaŭ simila signifo kaj etimologio. Ĉi tiuj vortoj ekzistas en „pluraj malsamaj lingvoj rezulte de samtempaj aŭ sinsekvaj enprenoj el la origina fonto”.⁵

En kelkaj planlingvoj, kiel Ido, Interlingua kaj Esperanto, la koncepto de internaciismo estas grava, ĉar la kreado de vortotrezoro baziĝas ĝuste sur enprenado de tiuj internaciaĵoj. Por Interlingua ĝi estas la savrimeno por krei ĝian tutan vortostokon, dum por E-o, laŭ ĝia kreinto, ajna parolanto de la lingvo povas enkonduki siajn proprajn novajn vortojn, kondiĉe, ke ĝi serĉas la konsilojn de tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel plej aŭtoritataj en la E-komunumo.

Ĉi tiu libereco krei novajn vortojn en E-o ĝis nun ne kondukis al granda disopinado. Pli ĝuste, ĝi estas grava faktoro por la disvolviĝo de la lingvo. Tamen, ekzistas diversaj skoloj de pensado pri la principoj kiujn enkondukoj devas plenumi. Verkistoj, kiuj uzas novajn vortojn, kutime precizigas iliajn signifojn en piednoto aŭ en aparta listo da neologismoj. Malofte verkisto proponas novan vorton, kiu portas neniun rilaton al iu ajn el la fontolingvoj de E-o.⁶ Ŝajne la fakto, ke E-o estas pli dependa por sia evoluo de skribata mesaĝado ol de parola komunikado, sufiĉas por malhelpi dialektformadon. La publikigo de vortaroj havas ankaŭ fortan normigan influon.

La fontolingvoj de E-o ne estas klare difinitaj. Ĉi tiu temo estas tamen grava en rilato al la „dekkvina regulo” de la Fundamenta Gramatiko, kies unua parto tekstas: *La tiel nomataj vortoj fremdaj, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo E-o sen ŝanĝo,*

⁵ Citita el I.V. Arnold, kiun mi ne sukcesas identigi

⁶ Krom se ĝi nomas ne-Eŭropan objekton aŭ kulturalan fenomenon.

ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo. Ĉio ĉi montras, ke en la viverao de Zamenhof (1859-1917) lingvistoj kaj la E-komunumo ĉiuj konsentis, ke E-o estas eŭropa lingvo. Per „la plimulto de la lingvoj” estis celita la plimulto de eŭropaj fontolingvoj. Ne malfacilas dedukti el primaraj⁷ kaj sekundaraj⁸ esploroj kiuj estas tiuj fontolingvoj⁹: du ĝermanaj lingvoj (germana kaj angla), du slavaj (pola kaj rusa) kaj tri aŭ kvar latinidaj (franca, hispana, itala aŭ la portugala).¹⁰

En tutmondiĝanta mondo, kie la influo de la ne-eŭropaj lingvoj, pro sia nombro de parolantoj aŭ sia ekonomia signifo, senĉese kreskas, ankaŭ tutmondeca interpreto de la dekkvina regulo eblas. Ankaŭ tiam necesas distingi inter grandaj kaj malgrandaj lingvoj, kiel Zamenhof faris jam pri la eŭropaj lingvoj, ĉar li prenis el inter ili nur tiujn konsideratajn „gravaj civilizitaj” lingvoj. Tio instigis min ekformi ilon, kiu, depende de la uzelekto el tri malsamaj kriterioj difinantaj la gravecon de lingvo, permesas determini kiun gradon de internacieco iu certa vorto havas.

En la E-versio de ĉi tiu interaga programo unue estas kalkulita la grado de internacieco de vorto, laŭ la sep aŭ ok eŭropaj lingvoj menciitaj supre. En la angla versio tiu aliro ne estas uzata kaj la demando estas simple „How international is your word?” (Kiom internacia estas via vorto?) Tie, kiel en la E-versio, estas ekzamenataj kaj la 28 eŭropaj lingvoj kun minimume tri

⁷ Celataj estas: 1) „Fundamento de Esperanto”, kiu en la unua renkontiĝo de e-istoj rekonata kiel „tutmonda kongreso”, en 1905 en Bulonjo ĉe Maro, estis aprobita kiel la netuŝebla bazo de E-o, kaj postaj eldiroj, speciale de la iniciatinto L.L. Zamenhof mem, pri ĝia signifo. 2) la lingvoj en kiuj la „Unua Libro” (en kiu E-o estis publikigita) eldoniĝis en 1887 kaj postaj jaroj

⁸ Sekundaraj esploroj estas tiuj de Helmut Welger, *American Philosophical Society* kaj Alfred Michaux

⁹ Tio aplikiĝas ĉefe al la kreado de novaj radikvortoj. Por la Universala Vortaro, kiu estas parto de la Fundamento, oni povas asigni ankaŭ Latinon fontolingvo.

¹⁰ Tiu ĉi listo preskaŭ plene koincidas kun la listo de tiel nomataj kontrollingvoj por la planlingvo Interlingua. La primaraj kontrollingvoj estas la angla, franca, itala, hispana kaj portugala, el kiuj la hispana kaj portugala estas prenataj kiel unu lingvo. La sekundaraj kontrollingvoj estas la germana kaj rusa. Laŭ *la regulo de tri*, vorto akiras enprenrajton en Interlingua se ĝi enestas en minimume tri el la kvar primaraj kontrollingvoj, dum unu el aŭ ambaŭ sekundaraj kontrollingvoj povas anstataŭi primaran kontrollingvon. (vidu http://en.wikipedia.org/wiki/Interlingua_and_eligibility_of_international_words)

milionoj da parolantoj kaj la 51 lingvoj en la mondo kun almenaŭ tri milionoj da parolantoj, estante ankaŭ traduklingvoj en *Google Translate*.

Espereble la programo helpas al la uzanto gajni pli realecan ideon pri la transprenado de vortoj inter lingvoj kaj pri tio kiuj lingvaroj manifestas sin kiel lingvogrupoj klare influantaj unu la alian, sed havantaj malmultan aŭ neniun afinecon kun aliaj lingvaj grupoj. Unu el tiuj grupoj estas la anglo-latinida lingvogrupo. Pro la vasteco de ĝuste tiu lingvogrupo inter eŭropanoj ekzistas ofte falsa sento pri internacieco de vortoj, kiu estas bazita nur sur ilia larĝa distribuiteco en la eŭropaj lingvoj. Jes ja ekzistas internacia rekonateco de eŭropaj vortoj pro la amasa lernado de fremdaj (eŭropaj) lingvoj ekster Eŭropo. Tamen, ĉi tio koncernas tre limigitan vortostokon. Se ni apartigas tiun, tiam la tutmonda videbleco de eŭropaj vortoj estas multe malpli alta ol atendate.

Interese tamen estas ke ekzistas ankaŭ vortoj, kiuj penetris vere en ĉiujn angulojn de la lingva universo. Prenu la vorton *arsenalo*, kiu estas komuna kaj en la ĉina (13 lingvoj kun 1,2 miliardoj da denaskaj parolantoj) kaj la araba (224 milionoj da denaskaj parolantoj). Ĝi estas devena el la araba *Dar As-ŝinā'a* (domo de konstruado) kaj penetris el tie en la italan kaj ĉinan. 85,1% de la monda loĝantaro scias „arsenalo” en sia propra lingvo. Se konsideri la gravecon de lingvoj – kaj tio estas farita en la programo de *www.esp-evoluo.org* – tiam ĝia grado de internacieco estas 90,7%. Por Eŭropo tiu speco de grado de internacieco estas eĉ 100%.

Kiel pluraj vortoj ankaŭ povas konkurenci pri internacia konateco, videbliĝas ekz. el la sinonimoj *akumulatoro*, *baterio* kaj *pilo*. *Akumulatoro* en Eŭropo estas la plej internacia vorto (97,0%), dum tutmonde tiun honoron ricevas *baterio* (75,2%).

Ankaŭ por vortarscienca esplorado el ne-eŭropa perspektivo la ebloj de la interaga programo estas senlimaj. Koneco de la latina alfabeto estas supozata. Por la tradukoj bazitaj sur *Google Translate* en preskaŭ ĉiuj kazoj la latina transskribo estas donata. Kie tio ne okazas, nome por la araba, la hebrea, la persa kaj la urdua, plusendo estas enprogramigita al retejo kiu ja montras la transskribon. Komprenible, la tradukoj donataj de *Google Translate* devas esti rigardataj atente. Tiucele la programo ankaŭ donas avertojn kaj klarajn instrukciojn.

BEK-kurso (1981-2013) kaj la tradicia Cseh-kurso (1925-1995). Kiaj estas la diferencoj?

de *Dennis Edward KEEFE* (Universitato de Nankino, Ĉinujo)



Mi ĵus finlegis la tre interesan libron faritan de Katalin KOVÁTS pri la instrua vivo de Tiberio MORARIU, unu el la plej aktivaj instruistoj en la historio de la Esperanto-movado. S-ro Morariu utiligis la faman Cseh-metodon por instrui milojn kaj milojn da gelernantoj, ĉefe en Svedujo, sed ankaŭ en najbaraj landoj kiaj Danujo, Germanujo, Svislando kaj Aŭstrio. Kiel multe da esperantistoj bone scias, la metodo utiligata de Morariu, la Cseh-metodo, estis probable la plej uzata el ĉiuj Esperantaj instrumetodoj en nia historio; ankoraŭ hodiaŭ ĝi havas multe da entuziasmaj adeptoj, kiuj, kiel Morariu, lerte utiligas la Cseh-metodon por instrui kaj altiri novajn homojn al Esperanto.

Pro la populareco de la Cseh-metodo, kaj ankaŭ pro ĝiaj klaraj principoj, kaj la preciza enhavo de la kurso, mi volas uzi la Cseh-metodon por kompari la relative nekonatan, sed relative efikan BEK-kurson, de kiu mi mem estas la aŭtoro. Multe da homoj kiuj ne estas profesiaj lingvo-instruistoj, kaj kiuj ne havas multe da spertoj pri instruado de lingvoj ofte alvenas al la misa konkludo ke la Cseh-kurso kaj la BEK-kurso iel similas. Tamen, la vero estas, ke la du lernigo-sistemoj estas tiel malsamaj kiel karbo kaj kotono. Kiaj do estas la fundamentaj diferencoj? Mi listigos ilin.

Diferenco 1: TEMPODAŬRO: La BEK-kurso (poste, BEK) estas multe pli longdaŭra ol la Cseh-kurso (poste, ĈEK). En Eŭropo, BEK daŭras 80 horojn, kaj en Ĉinujo kaj Japanio, pli ol 200. ĈEK, aliflanke, ofte finiĝas post 20 ĝis 40 horoj da instruado.

Diferenco 2: MULTMETODECO: BEK estas multmetoda kurso, kaj la elekto de la metodo por instrui dependas kaj de la instruisto, kaj de la speco de gelernantoj, kaj de la situacio, ĉu eŭroplingva aŭ azilingva, ekzemple. Ni diru, ke BEK klare dividas la lecionojn inter instruado kaj praktikado, kaj dum la INSTRUADO, la kursgvidanto povas utiligi kian ajn metodon: la

tradukan metodon, la rektan metodon, la komunikivan metodon kaj kiun ajn alian. Ne gravas la instrua metodo en BEK. Dum la praktikada parto de BEK, tamen, la gelernantoj utiligas nur E-on. En ĈEK, la instruanto utiligas la rektan metodon, kaj nur ĝin. Ĉu instruante, ĉu praktikigante, la instruisto uzas nur la rektan metodon.

Diferenco 3: KAPABLECOJ: BEK celas ne nur la fluan paroladon de la lernanto, sed ankaŭ la sendependan legokapablon. Ĉe la fino de la BEK-kurso gravas, ke la gelernantoj kapablu utiligi PIV-on kaj kapablu kompreni la relative malfacilajn gramatikaĵojn trovatajn en nia literaturo kaj skriba lingvo. ĈEK, kiel bone konate, estas, antaŭ ĉio, paroliga kurso.

Diferenco 4: LIBERA ESPRIMADO: Unu de la celoj de BEK estas libera parolado, libera skribado. Ekde la unua tago, gelernantoj faras parolekzercojn kaj skribekzercojn en kiuj ili devas paroli aŭ skribi, libere, tre longe, almenaŭ 20 aŭ 30 frazojn. Tia ekzercado estas malofta en ĈEK, kie la gelernantoj koncentriĝas ĉefe pri la ĥora ripetado, kaj unufrazaj respondoj.

Diferenco 5: INTENSIVECO: BEK sukcesas pli bone kiam la lernado estas tre tre intensiva, kutime ok horojn ĉiutage. Tiu tre alta nivelo de intenseco eblas pro du kialoj: unue, la plejparto de la laboro okazas en grupetoj, sendepende, kaj tiel la instruisto ne laciĝas. Due, la instruisto multe variigas la lecionojn, ŝanĝante la metodon, ŝanĝante la celkapablon, ŝanĝante la ritmon, alternante inter legado, parolado, skribado, aŭskultado, ekzamenado ktp. Kun tiaj ŝanĝoj, malfacilas enuiĝi aŭ tro laciĝi. ĈEK, laŭ Andreo CSEH, funkciis pli bone kiam la ĉiutaga lernotempo ne preterpasas 2 aŭ 3 horojn. Li diris, ke post la dua horo de leciono, la gelernantoj kaj la instruisto komencas tro laciĝi.

Diferenco 6: GRUPLABORO: BEK gelernantoj praktikas en grupetoj de 3 aŭ 4 homoj ĝis 90 elcentoj el la tuta kursotempo, sen la observo aŭ aŭskultado de la instruisto. En ĈEK, tradicie la praktikado okazas sub la rekta gvidado de la kursgvidanto. Ĥora ripetigo kaj ripetado estas oftajoj en ĈEK, sed maloftajoj en BEK.

Diferenco 7: OFTECO DE NIVELO-KONTROLADO: BEKanoj ekzameniĝas unu aŭ dufoje ĉiutage per skriba ekzameneto. Parolado-ekamenetoj ankaŭ oftas en kiuj la lernanto devas paroli almenaŭ 20 ĝis 50 frazojn

sinsekvajn sentraduke. Skribaj ekzamenoj, laŭ mia scio, estis maloftaĵoj dum la tradicia ĈEK. Parolekzamenoj, kiam la lernanto parolas longe kaj libere, ne okazas ofte en ĈEK.

Diferenco 8: AMUZILOJ: BEK-instruado okazas sen motivigiloj aŭ amuzaĵoj. Oni ne ludas, oni ne kantas, oni ne ŝercas. Ĉio baziĝas sur la lernado de vortoj kaj gramatiko, kion BEK konsideras sufiĉe interesa. BEK estas tre serioza kurso. ĈEK provas je ĉiu paŝo esti interesa kaj alloga por la lernanto.

Diferenco 9: HEJMTASKOJ: En BEK, ili ege abundas. La gelernantoj devas lerni novajn vortojn, prepari por ekzameniĝi ĉiutage, legi kaj skribi multe. Hejmtaskoj estas farataj vespere kaj estas donataj al la kursgvadanto por korektado antaŭ la komenco de la sekva kurso. En ĈEK, hejmtaskoj relative maloftas.

Diferenco 10: SKRIBO-KAPABLO, LEGO-KAPABLO: Tuta duono de BEK koncentriĝas sur la skriba lingvo kie oftege troviĝis nefacilaj gramatikaj punktoj. Abundus ekzercoj pri ig- kaj iĝ- kaj pri la 18 participoformoj. ĈEK, aliflanke, donas nur kelkajn ekzercojn, sed plejparte tia enhavo estas malpli ol 5% el tiu de BEK.

Diferenco 11: ROLO DE LA KURSGVIDANTO: La rolo de la instruisto de BEK estas multe pli libera. La instruanto povas ŝanĝi la lernomaterialon kaj miksi ĝin kun aliaj lernomaterialoj, kun aliaj kursoj. Krome, la rolo de la instruisto estas multe pli malcentra. En BEK la praktikado ĉefe okazas en grupetoj de tri aŭ kvar gelernantoj, kiuj daŭre kune lernas kaj kune praktikas. La instruisto, do, ludas gravan, tamen ne tiom centran rolan. La rolo de la kursgvadanto estas pli tasko-organizanto ol gramatiko-instruanto. En ĈEK la instruisto estas la centro de la kurso, preskaŭ ĉiam. Forprenu la ĈEK-instruiston kaj la leciono haltas. Faru la samon en BEK, kaj la kursanoj daŭre laboras en grupo sen instruisto.

Diferenco 12: TRADUKADO: BEK, speciale en Azio, dependas de la tradukado por lerni la plejparton de la novaj vortoj. Tamen estas grave, ke la lernado de la vortoj okazu ANTAŬ la praktikado. En BEK kvankam oni lernas multege da vortoj tradukante, tamen lernantoj ne tradukas tutajn frazojn. Ili tradukas individuajn vortojn, sed nur por eklerni ilin. Poste ili

praktikos sen tradukado. En ĈEK, tradukado ne estas permesata, kiel en ĉiaj rektaj metodoj. Ĉio okazas en kaj per E-o.

Diferenco 13: PERFEKTECO DE LA INSTRUADO: La BEK-instruisto ne tiom zorgas pri la perfekta prezentado de la gramatikaĵoj. La emfazo estas sur praktikado, ne instruado. En ĈEK, instruistoj ege ege zorgas pri la prezentado kaj instruado de nova materialo.

Diferenco 14: PARTECO AŬ TUTECO: La kursgvidanto de BEK povas utiligi BEK kiel parton de alia kurso. BEK fundamente estas ekzercaro, kaj tiasence, ĝi estas kiel ingredienco en supo, utiligota kiam oportunas. Malfacile, tamen kursgvidantoj povas ĉerpi el ĈEK, laŭ mi. ĈEK iasence estas multe pli bone konstruita ol BEK, ĉar ĉiu paŝeto en ĈEK tre delikate rilatas al la antaŭa kaj al la sekva partoj.

Diferenco 15: LERTECO de la INSTRUISTO: BEK-kursgvidantoj ne bezonas esti tre viglaj aŭ tre interesaj homoj. BEK ne bezonas ian aktorecan stilon. La instruantoj ne bezonas havi fortan personecon. Eksperimentoj pri BEK en Hispanio, Francio, Usono kaj nun en Ĉinio montras, ke BEK listiĝas inter la plej facile instrueblaj kursoj. ĈEK, aliflanke, bezonas lertan, bone trejnitan, energian instruanton.

Do nun, vi, kara leganto, bone konstatas, ke BEK kaj ĈEK ege malsimilas kiel ŝipoj kaj ŝafoj. Tamen, ĉu ili ne havas etan ion similan? Ĉu ne estas komunaj partoj de tiuj kursoj? Tio eble estus alia artikolo, multe multe pli mallonga, do por ne atendigi vin, mi diru, ke ambaŭ kursoj relative zorge elektas la gramatikan ŝtuparon. Kion oni prezentas unue, kaj due kaj poste tio estas sufiĉe klare priskribita en ambaŭ kursoj. Tamen, ni ne forgesu la diferencon, jam menciitan, ke ĈEK limigas ĝin ĉefe al la parola gramatiko, dum BEK rekte alpaŝas IG- kaj IĜ, kaj la 18 participoformojn. Fakte, preskaŭ duono de la kurso BEK dediĉas sin al tiaj gramatikaĵoj.

Konklude, BEK kaj ĈEK estas tre malsimilaj kursoj, sed ĉu estas diferenco rilate lerno-rezultojn? Tio estas tute alia demando, kaj nur la utiligantoj de tiuj metodoj povas prikomenti tion. Ĉiaokaze, mi ĉiam diras al ĉiuj el miaj BEK-kursgvidantoj, ke estas bone lerni pri aliaj metodoj, aliaj aliroj, aliaj kursaroj. Koni ĈEK en profundeco estas bona helpilo por kiu ajn instruisto de E-o. Sed ankaŭ koni la tre malsimilan BEK.

Iam instruisto – ĉiam instruisto

Lastan jaron pensiuliĝis nia iama redaktiano Franz-Georg RÖSSLER. Li povas retrorigardi al pli ol 45 jaroj da propra instruado en diversaj funkcioj. Ankaŭ E-o ludis konsiderindan rolon. Cetere, li taksis sin malpli „konscia pedagogo” ol „praktika instruisto”. Li rakontu mem:

Klarigi, ekspliki ion, tio jam dekomence apartenis al la propraj trajtoj. Sed la vojo de komunika junulo al profesia instruisto povas esti kurba. Longe baris ĝin miaj ŝajne ĉion sciantaj instruistoj, kiuj disdonis lerno-taskojn, kies celojn kaj rezultojn mi tiam nur povis diveni. „Instruisto vi mem ne povas fariĝi. Vi neniam atingos la scion kaj la kapablon de viaj instruistoj”, mi sugestis al mi. Sed miaj konoj pri la muziko, la preferata fako, jam en la gimnaziaj jaroj instigis instrui la orgenan teknikon al kuzo kaj konatigi mian estontan edzinon kun la bekfluto. Dum la armea deĵorado en la sanitara servo oni komisiis al mi gvidi kursojn pri Unua Helpo.



Iom post iom mi komprenis, ke akiri eruditecon kaj transdoni la spertojn estas kontinua afero. Mi memstare preparis la enirigan ekzamenon al muzika altlernejo por fariĝi gimnazia instruisto kaj sukcesis en ĝi. Por la ekstudado de la aliaj fakoj geografio kaj muzikscienco, sufiĉis la abiturienta dokumento. En pli altaj semestroj iam kumuliĝis la lernokvanto tiom, ke mi intencis redukti la premon, transirante al la studado nur por bazaj klasoj. Sed modeloj pri tia ŝajna plifaciligado avertis kaj spronis al la venkado de la lastaj obstakloj.

Hodiaŭ neimageble, tiam dum la tuta studotempo ni gestudentoj nek aŭskultis unu lecionon pri pedagogio, nek praktikumis unu horon en ia lernejo. Ni akiris ja solidajn sciojn de niaj fakoj, sed oficiale nenian pri sistema instruado. Tamen jam tiutempe mi intense instruis, kiel unu inter la unuaj instruistoj de la ĵus fondita muziklernejo de la regiona registaro. Kaj mi komencis ĉe la bazo, instruante, kune kun mia edzino, al infanĝardenuloj la bazajn muzikelementojn. Duope ni devis esti en la klaso, ĉar regi la moviĝemon, la emociojn kaj la esprimemon perinstrumentan de la

komencantoj estis malfacila tasko. La salajro tamen nur estis unu, sed ni bezonis ĝin, ĉar ni sen iu subvencio, ĉiam memstare akiris nian panon. Ankaŭ la gvidado de diversaj korusoj havigis ĉiam pli da spertoj en la transdono de la propraj impulsoj.

Nur post la studado oni en „pedagogia seminario” provis formi nin al funkciantaj ŝtataj instruistoj. Sed tio elĉerpiĝis en la trudado de iaj socireformaj (post la 68aj jaroj!) pedagogiaj konceptoj. Ekzemple muziko ne restu plu scienco pri la esenco de la muzikaj elementoj, sed priskribo de propraj sentoj, komuna danco, ĵazumado. Geografio ne plu kono de la Tero, sed de „la homo en sia socia ĉirkaŭaĵo”. Ĉio garnita per lerneja juro kaj sidado malantaŭe en klasoj por „observi”. Nur en la lasta jarduono ni iom memstare rajtis instrui, kion oni memkompreneble ekzamenis. La notoj ĝenerale dependis de la aktuala bezono je gimnaziaj instruistoj.

Post tia pedagogia enkonduko oni disdividis nin inter la lernejoj. Min sendis la sorto al privata katolika, monaĥine gvidata gimnazio en Speyer. Kaj nur tie komencis la vera instruista vivobatalo. Ne lerninte pedagogiajn trukojn, mi memstare devis organizi la devigajn 24-26-semajnajn lecionojn plus la koruson kaj la orkestron. Kaj lukti en la unuaj jaroj kontraŭ la – milde esprimate – „kolektiva volo” de certaj klasoj, la malicemo aŭ nekapablo de unuopuloj, la intermiksiĝemo flanke de kolegoj, gepatroj, direktor(in!)oj, ordonrajtaj ŝtataj reformistoj, funkciuloj kaj burokratoj. Daŭris, ĝis disvolviĝis ekvilibro inter la eksteraj postuloj kaj la animstato de la instruisto. Okazis, ke mi fine apartenis entute 36 jarojn al tiu institucio, feliĉe sufiĉe memstare, sed je kosto de solista elportado de ĉiu ŝarĝo de mia fako.

Instruistan sukceson oni prefere mezuru laŭ la rezultoj. Muziko kiel „malgrava” fako ne multe validis en la okuloj de certaj lernantoj kaj gepatroj. Sed bonan noton ili tamen bezonis. Mi ja postulis nemalmultan teorion, sed fine mi tamen adaptis la notojn al la kapablo de la lernantoj. Mi ne donacis komplike bonajn notojn, sed en tempoj, kiam oni multe altigis la kvanton de gimnazie ekzamenitaj personoj (por tute ne paroli pri „ĝismature edukiĝintaj”), mi foje embarasiĝis pro la devo kontribui en tia produktado. Kiam mi nuntempe hazarde renkontas iaman lernanton mian, mi ĉiam demandas min, kian impreson mi postlasis. Ja estas kelkaj, kiuj opinias, ke mi ne ekkonis iliajn talentojn, mistaksis ilin, fuŝis iliajn karierojn, eĉ damaĝis ilin psike. Kaj estas aliaj, kiuj gaje kaj volonte retrorigardas al la

muzikumado, al instruhoroj, al la kvanto da lernitaĵoj. La mezuma lernanto almenaŭ lernis instrumenton ĉe mi, kantis multe, ĝuis foje humuran instruadon kaj lernis multe fake, se li mem volis. Ĉu estas multe pli atingebla per pli „lernantocentra” instruado, per pli „pedagogia”, societema konduto? Evidente ankaŭ kampe de tiu koncepto ne mankas konfliktoj kaj vundiĝas ambaŭ partneroj. Mi ne bezonis psikiatron, kaj lernantoj ne tian pro mi.

Kiam mi konatiĝis en 1985 kun E-o, baldaŭ poste mi proponis kursojn kaj seminariojn en mia lernejo. Multo okazis en tiu ĉi kadro. Oni povas legi ĝin en la eldonaĵo „Esperanto en la Nikolaus-von-Weis-gimnazio en Speyer” (1990). Poste mi rezignis tie misii, ne pro malkredo je E-o, sed pro komprenebla tempomanko de la lernantoj, plenaj je devoj kaj emoj. Sed kontinue mi provis, ja ne regule instruante, per artikoloj, paroladoj, mencioj, malgrandaj signoj atesti, se ne instruati E-on. En la movado mem mi kune kun mia edzino gvidis lecionojn dum la unua Esperanta ILEI-gimnazio en Bratislava (Preßburg/Pozsony) kaj prezentis model-lecionojn en ILEI-kunveno dum la apuda UK en Vieno 1992. Kadre de la Kongresa universitato mi plurfoje prelegis, kaj ankaŭ aliaokaze mi prezentis kaj prezentas ne rare ion pri kulturaj temoj, plej ofte ne kun distra, sed instrua intenco. Sed pri pedagogio ne plu temu. Eble mi trovis mian propran instruistan metodon, sen teorio. Se ne, oni ne plu invitus min.

Jen la provo pri iom sobra resumo de longjare profesia instruisto, kiu volonte instruis kaj ne kapablas cedi al sia emo instruadi iel, almenaŭ tiom longe, kiom eltenos la aliuloj la instruistan montrofigron.

Recenzo


Saluton! Talking to the Whole Wide World (Parolanta al la Tuta Vasta Mondo), Penelope VOS, Mondeto¹¹, 2009. ISBN 978 0 646 51961-6. A4, 202-paĝa, spiralbindita kun KD librofino. Prezo: € 80

Jen ampleksa verko, kiu fontas el jardeko da spertoj instrui E-on en aŭstraliaj elementaj lernejoj. Ĝi estas grandparte anglalingva kaj alparolas instruistojn en elementaj lernejoj (t.e. ili kutime devas instrui ĉiujn studo-

¹¹ Detalojn vidu en la anglalingva retejo www.mondeto.com.

temojn). Aŭstralio ĉiam pli rimarkas sian ŝanĝiĝantan rolon en la mondo, kun signifa reorientiĝo al Azio; tio levas bezonojn por lingvo-lernado, kun frua komenco dezirinda. Tial naskiĝis la studtemo *LOTE – Languages Other Than English*. (LAOLA – Lingvoj Aliaj Ol La Angla).

Inter la ĉefaj celoj de LAOLA estas stimuli intereson pri aliaj kulturoj, ekkoni la mekanismojn de lingvoj, sproni komunikan memfidon kaj pavimi la vojon al pli intensa lingvo-lernado en altlernejoj kaj poste.



La libro prezentas la esencon de E-o en 40 partoj, ĉiu destinita por unu semajno – do praktike por unu studjaro. Abundas kantoj (ĉu originale E-aj, ĉu tradukoj aŭ reverkoj laŭ melodioj popularaj en Aŭstralio.) Ĝi estas riĉe piprumita krome per rimoj, ŝercoj, ludoj kaj ekzercoj. Aperas ĉiŝtupe ‘frazo de la semajno’ kaj ‘kultura fokuso’: taskoj pri semajna temo por esplorado ĉe aliaj kulturoj (E-o ja malfermas pardonon al multaj, ne nur unu aŭ malmultaj, kiel ĉe naciaj lingvoj). La libro donas praktikajn konsilojn al instruistoj kiel prezenti la dozitan materialon al la lernantoj – laŭ la ideo, ke la instruisto

lernos la lingvon preskaŭ samtempe kun la infanoj.

La verko prezentas klaran didaktikan skemon, kiu unuaŝtupe prezentas la plenan alfabeton, vortojn, unuajn frazojn, salutojn, demandojn kaj respondojn, kolorojn, numerojn, pluralon ks. Kritikeble ‘verboj’ venas al la ŝtuparo nur en la 18a semajno kaj ĉi-kaze nur netransitivaj verboj estas prezentitaj. Lernantoj kiuj en sia denaska lingvo ne konas akuzativon, bezonas pli fruan aliron al la ecoj de verboj – eĉ se ne ampleksan, almenaŭ bazan. Transitivaj verboj, kune kun konciza klarigo pri la akuzativo, venas nur en la 25a semajno, kun imperativoj ĉe 27, infinitivoj ĉe 29, -ig kaj -iĝ ĉe 30 (trafe titolita ‘Ŝanĝoj’), participoj aktivaj kaj pasivoj ĉe 35 kaj 36.

Tra la unuaj 18 semajnoj, la instrumaterialo dependas plejparte de ‘estas’, aliaj uzataj verboj aperas sen klarigo. Jam ekde la 5a semajno, la kantoj

prezentas amason da verboj – transitivaj kaj ne, kaj eĉ ĉiujn multajn monatojn poste klarigitaj verbformoj. Resume, klara kaj brava didaktika ŝtuparo, sed neniel verbo-centra.

Librokomence aperas konsiloj kiel aperigi la ĉapelitajn literojn ekrane, plie ‘Aferoj kiujn via instruisto diros’, kiu ja kunigas valorajn praktikajn frazojn kaj kuraĝigas la instruistojn uzi la lingvon dekomence en veraj komunikaj situacioj, sed la frazoj havas liberan verbuzon – kiu ja postulus almenaŭ bazan klarigon. La libro frontas honeste niajn dilemojn pri malegaleca trakto de la seksoj (kiun, cetere, faras ankaŭ la angla), en semajno 6 la aŭtorino (tiel!) skizas la problemon kaj la ĝisnunajn solvo-proponojn, indikante, ke neniu el ili ricevis formalan aprobon, nek vastan uzakcepton. La libro donas gvidon (semajno 31) kiel trakti idiomojn (kiuj ja ne mankas en la aŭstralia angla – kelkajn el ili eĉ la alilandaj angloparolantoj apenaŭ komprenas!), emfazante la lerton juĝi kiam temas pri idiomoj, kaj la neceson trovi la veran sencon de la diraĵo. Multloke, klarigoj baziĝas sur ecoj de la angla, kiuj estas aŭ similaj aŭ malsimilaj en E-o. Ekzemple, en semajno 19 aperas valora ekzemplo pri malpreciza uzo de la angla prepozicio ‘with’ – ni vidas sep frazojn, ĉiuj kun tiu vorto ene, sed kun sep malsamaj kaj pli logikaj kaj signifofajnigaj solvoj en E-o, uzantaj: kun, kontraŭ, per, pro, el, pri, rilate al. Librofine aperas listo de 73 praktikaj sugestoj por firmigaj ekzercoj kaj ludoj.

La teknika nivelo de la libro bonas, kun plenkolora presado tra la tuto, ĝi estas multe kaj bone ilustrita, kun nemulta materialo ĉiupaĝe. Kvankam klare verkita por aŭstraliaj kondiĉoj, ĝi liveras valoran modelon kiu, post adaptiĝo, povas doni novajn impulsojn alilande. Ĝia granda mesaĝo estas kiel utile uzi nacian lingvon ne nur por doni tradukojn de la lernmaterialo (debatebla taktiko), sed ankaŭ por doni gvidon kaj inspiron samtempe al la lernantoj kaj potencialaj instruistoj. (SMG)

El la landoj kaj sekcioj

Ĉeĥio

En la aŭtuna semestro 2012 mi instruis la studobjekton *Enkonduko en interlingvistikon* en la Filozofia fakultato de Universitato Masaryk en Brno. Estis du instruhoroj semajne kaj fine kolokvo. El 28 studentoj, komence

registritaj, restis 15. Mi instruis ankaŭ la studobjekton *Esperanto II* kiel daŭrigon de *Esperanto I* el la printempa semestro 2012 por du studentinoj. Fine estas ankaŭ kolokvo. *Informis: Josef VOJÁČEK*

Finnlando

Tutmonda Esperanta Fabelkonkurso

La Tutmondan Esperantan Fabelkonkurson por infanoj ĝis la aĝo de 13 jaroj fondis la nord-finna sinjorino Aini VÄÄRÄNIEMI en 2000. Dum la pasintaj 12 jaroj ne abunde venadis fabeletoj verkitaj de E-aj etuloj kaj geknaboj. En la jaro 2012 al ĝi venis nur unu konkursaĵo. Espereble en 2013 denove venos pli multaj. La konkurso havas 4 kategoriojn: A) ĝis 9-jaruloj, B) por 10-11-jaruloj, C) 12-13-jaruloj; kaj la kategorion Grupoj. Oni juĝas la fabelojn laŭ la originaleco kaj ideoj, ioma lingva malperfekteco ne estas priatentata. La limdato estas 15.09.2013. La fabelojn oni sendu al: *Esperanto-societo de Oulu, Vääräjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando* aŭ rete al: *aini.esp@hotmail.com*.

laŭ la informoj de Raita PYHÄLÄ, Finnlando

Bonvenon en finna Somera Esperanto-kurso

Somera E-kurso en Finnlando okazos en Orivesi-instituto 8.–12.7.2013. La urbo Orivesi situas 45 km-ojn de Tampere kaj 109 km-ojn de Jyväskylä. En la kurso instruos Dalia PILECKIENĖ el Litovio kaj Sylvia HÄMÄLÄINEN en du diversnivelaĵoj grupoj, daŭriga kaj elementa. Formiĝos tria grupo, se al la tuta kurso aliĝos sufiĉa kvanto da studentoj. Krom lecionoj, oni havos diversajn programerojn. La kursokotizo estas €390, kiu inkludas instruadon, loĝadon kaj manĝojn. Krompago pri unupersona ĉambro estas €80. Aliĝo ĝis 14.6.2013. Pliajn sciojn vi trovas en *www.esperanto.fi*. Detalojn petu de *Tiina OITTINEN, eafsekretario@esperanto.fi, 050 549 4709 (de eksterlando +358 2 230 5319)* *laŭ informoj de Sylvia HÄMÄLÄINEN*

Italio

Ekspozicio en la Nacia Biblioteko de E-o de Massa

Hodiaŭ mi deziras paroli al vi pri la ekspozicio „Zamenhof kaj Esperanto, karto kaj taglibroj de vojaĝoj kaj kongresoj”, inaŭgurita en Massa (Toskanio) la 16an de la pasinta decembro. Ni ĉiuj rememoras la neelĉerpeblan viklecon kaj animforton de nia Katina DAZZINI, tamen eble ne ĉiuj scias ke ŝi lasis al ni precizeman raporton pri siaj kunvenoj kaj agadoj tra la mondo, kiu por ŝi havis la malfermitajn limojn de E-ujo. Fotoj,

poŝtkartoj, trajn- kaj aviadil-biletoj, moneroj, turismaj prospektoj kaj eĉ saketo de sukero estas montrataj en ŝiaj kvadratitaj kajeroj plenigitaj per preciza ronda skribo de licea instruistino.

Simonini Aleksandro, direktoro de la Nacia Biblioteko de E-o kun sidejo en la Ŝtata Arkivo de Massa Centro, havas la meriton esti elfosinta tiujn ĉi dokumentojn, kiuj permesas al ni revivigi ne nur la vivon kaj kontaktojn de Katina kaj de ŝia frato Mario, sed duonjarcenton de esperantista sindevontigo. Aparte ili rekonstruas detale la etoson de la italaj kaj universalaj kongresoj kaj la instruajn agadojn de la internacia lingvo en Italio kaj eksterlande. Inter la maloftaj pecoj de la biblioteko oni povas admiri kolekton de 72 „ŝlosiloj” en pluraj lingvoj kaj fotojn de la unuaj universalaj kongresoj kaj de la deksesna Konferenco de ILEI, en Seiano (Italio).

La e-ista publiko havas ankaŭ la eblon speguliĝi en la ekspozicio, rigardante siajn bildojn kaj tiujn de konatoj en la fotoj, kiujn Simonini skanis zorge kaj lerte kaj poste aranĝis en videa prezentaĵo. Mi esperas, ke la samideanoj povos pli bone apreci tiun ĉi ŝancon studi kaj enketi la historion de la lingvo kaj de ĝiaj ŝatantoj.

Ankaŭ la institucio, kiu gastigas la ekspozicion, havas interesan historion. La biblioteko de E-o ne estis ĉiam en la Ŝtata Arkivo de Massa. Komence la heredaĵo de la gefratoj Dazzini estis akceptita en la kastelo Malaspina. Tra la jaroj pluraj esperantistoj kontribuis al la riĉiĝo de la kolekto. En dokumento ĉeestanta en la ekspozicio oni legas, ekzemple, la liston de samideanoj kiuj kontribuis al la aĉeto de librobreto por la kastelo en 1979:

„Por aĉeti librobreton por la Kastelo donacas

- | | |
|--|----------|
| 1) <i>Dell'Aringa Norma – Mantovo</i> | £ 10.000 |
| 2) <i>Bertoletti Fabio – Milano</i> | £ 50.000 |
| 3) <i>Catullo K. Adriana Balocco – Verono</i> | £ 10.000 |
| 4) <i>Pisa Esp. Grupo – post Pisa Kongreso</i> | £ 25.000 |
| 5) <i>Terranani Lucia</i> | £ 10.000 |
| 6) <i>Dell'Aringa Norma - Mantovo</i> | £ 10.000 |

Sume kolektiĝis je la fino de februaro 1979 £ 115.000”

Grandan dankon al la E-grupo de Massa kaj aparte al d-ro Simonini, la prizorganto de la ekspozicio. Oni atendis aliajn vizitantojn, eĉ se d-ro Simonini ne ĉiam povis akompani ilin persone, krom se oni sukcesis aranĝi la viziton anticipe. Sed nia „granda” Sandro de Massa asertis ke „ĉiukaze e-istoj ne bezonas gvidistojn aŭ tradukistojn, ĉar vi ĉiuj estas pli kapablaj ol mi. Nun ni estas studentaj kiamaniere ŝargi videon je alta kvalito en la retejo www.doktoroesperanto.it.”

Jen aliaj retpaĝoj pri la Nacia Biblioteko de Esperanto de Massa (Italio):

<http://www.youtube.com/watch?v=-mFEPuE9eqM&feature=youtu.be>

<http://www.youtube.com/watch?v=NPzpeBEU3ak>

<http://www.youtube.com/watch?v=-mFEPuE9eqM>

<http://www.flickr.com/photos/75818695@N05/sets/72157629188480525>

Luigia OBERRAUCH MADELLA

Kanado kaj Usono

En la jarkunsido de 2012 en Dalaso, Teksaso, la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (AAIE) komencis elekti funkciulojn por tri-jara oficperido laŭ la nova politiko de ILEI: prezidanto Ronald GLOSSOP, vicprezidanto Jeremy ALDRICH, kasisto Chuck MAYS, koresponda sekretario Doroteo HOLLAND kaj eduka sekretario Gary ANDERSON. La nova redaktoro de la kvaronjara bulteno estas D. Gary GRADY, ĝia retejo estas <<http://aaie.us>>.

La 3 ILEI-komitatoj por AAIE estos Duncan CHARTERS, Ron GLOSSOP, kaj Lusi HARMON. Vilĉjo HARRIS antaŭe estis ILEI-komitatano, sed en 2012 ĉe la ILEI-konferenco en Kunming li estis elektita la nova kasisto por ILEI. En la jaro forpasis Mary NAPOLITAN kaj Dori VALLON-WHEELER. Ambaŭ antaŭ kelkaj jaroj estis gravaj funkciuloj de AAIE.

En marto kaj en oktobro s-ro GLOSSOP prezentis prelegeton ĉe konferencoj de instruistoj de fremdaj lingvoj en la ŝtato Viskonsino kaj la ŝtato Nord-Karolino. La temo estis „kiel la instruado de E-o dum 2-3 semajnoj je la komenco de la kurso efike helpus anglaparolantajn studentojn pli rapide poste lerni eŭropajn naciajn lingvojn”.

En 2013 la AAIE-jarkunsido okazos en Raleigh, Nord-Karolino dum la jarkongreso de E-USA post NASK 2013 [*vidu la kalendaron sur p. 38*].

Ronald GLOSSOP

Kroatio

Zamenhof-tago en kvar kroataj urboj

Je via sano, Samideanoj! Per tiuj vortoj tostis kroataj esperantistoj, tintigante la glasojn kun speciala „Zamenhof-taga vino”, kiam ili kolektiĝis por festi kune la 125-an datrevenon de E-o, kaj la plej gravan festotagon de E-ujo: la Zamenhofan tagon. La festo okazis en kvar urboj:

En **Varaĝdin**, la E-societo „Božidar Vanĉik” organizis ekspozicion pri Tibor Sekelj en la Urba biblioteko „Metel Ožegović”, kie prelegis Spomenka ŠTIMEC al 19 ĉeestantoj.

En **Zagreb**, la Etnografia muzeo kaj Kroata E-Ligo invitis al prezentado de la libro kaj tiurilata ekspozicio: *Tibor Sekelj – Aliaj homoj kaj landoj*. Kolektiĝis pli ol 60 esperantistoj kaj neesperantistoj en la muzeo por ĉeesti la lanĉon de la nova libro de Tibor Sekelj. Pri la verkisto parolis Damodar FRLAN kaj Spomenka ŠTIMEC.

En **Rijeka** en la societejo de E-Societo Rijeka parolis pri la vivo de Zamenhof Nataša BATISTIĆ kaj deklamis Vjekoslav MORANKIĆ.

La plej multe da esperantistoj kunvenis en la festo en **Bjelovar** [vd la foton sube – *NdlR*] kiun organizis Bjelovara Esperantista Societo kunlabore kun Dokumenta E-Centro el Đurđevac kaj E-societo Estonteco el Križevci.



En la Popola biblioteko „Petar Preradović” okazis 3 ekspozicioj: „La vivo tra objektivo” de la e-isto Ivica ŠĆEPANPVIĆ, „Dudek numeroj de la revuo Zagreba Esperantisto”, obstine aperanta ekde 2007, kaj „La mondo estas mirinda ĝardeno” en kiu la bjelovaranoj prezentis ĉirkaŭ 120 gratulkartojn, ricevitaĵojn de e-istoj el la mondo. Salutparolis Franjo FORJAN. Prezentita estis la nova libro de Zdravko SELEŠ, titolita *Sonĝoj kaj ombroj*, kiun li verkis en tri lingvoj: la kajkava dialekto, la norma kroata kaj E-o. Festparolis Josip PLEADIN kaj Radenko MILOŠEVIĆ.

laŭ informoj de Marija JERKOVIĆ (Kroatio)

Rumanio

Tutlanda E-simpozio en Rumanio

Inter la 5-a kaj 7-a de oktobro 2012 la rumanaj e-istoj kuniĝis en Răscruci (Cluj). Partoprenis la aranĝon ĉ. 40 personoj, inter ili gastoj ankaŭ el Hungario kaj Serbio. La temo de la simpozio estis *Esperanto kaj edukado* kaj gvidis ĝin Aurora Bute. La unua parto de la simpozio, *Edukado pri E-o*, enhavis prelegojn pri E-kursoj, projektoj, universalaj E-aranĝoj, la historio de la E-agado, (*La kurso e-125* – Stefan MacGill, *La mondo laŭ la vizioj de Zamenhof kaj Martinus* – Mihai Trifoi, *La E-movado en Transilvanio ĝis la unua mondmilito* – Marian Vochin, *La projekto Comenius* – Mariana Berariu, *Universalaj E-aranĝoj en 2012* - Aurora Bute) kaj en la dua parto, *Edukado per E-o*, oni prelegis ekz. pri komputado, medicino, religio, historio, geografio: *Komputilprograma ilaro por elektronikaj lingvokursoj* - Radojica Petrović, *Sur la vojo de Sankta Jakobo* – Jozefo E. Nagy, *Kelkaj dokumentoj pri la instruado de apotekistoj, kadre de la Universitato en la urbo Cluj inter 1872-1919* – Ștefan Budahazy, *E-filmfestivalo en Pollando* – Emil Crâncău, *La Biblioteko de Aleksandrio* – Mihaela Dolca, *La Danuba delto* – Adriana Dolca k.a.

Mihai Trifoi gvidis la *Konversacian Rondon*, sabate kaj dimanĉe, pri manĝoj, pladoj kaj oni argumentis por kaj kontraŭ la vegetarismo. Interesa estis la *Debato*, okazanta sabaton, pri la temo *Ĉu E-o estas facila lingvo?* Gvidis la argumentadon Radojica Petrović, la du „batalantoj” estis Stefan MacGill kaj Jozefo E. Nagy. En la fino, ambaŭ flankoj konsentis, ke *ĝis iu grado E-o esta simpla, post tiu grado, E-o estas malfacila*.

Dum la ekskursita tago ni vizitis la Kastelon Bánffy de Bonțida, la urbon Gherla kaj la Monaĥejon Nicula. Okazis ankaŭ estarkunveno de la landa asocio kaj ILEI-sekcio, dum triona estraro de ILEI (S. MacGill, R. Petrović kaj E. Sereghy) kunvenis aparte. La etoso estis vere e-ista, ĉio iris glate danke al la modela laboro de la organizantoj, Mariana Berariu kaj Adrian Mărginean, al kiuj iras niaj dankoj! *laŭ la informoj de Aurora BUTE*

Ukrainio

Scienca konferenco okazos en Ukrainio

Ekde septembro 2012 d-rino Nina Danylyuk estras la Katedron pri Latinidaj Lingvoj kaj Interlingvistiko en Orienteŭropa Nacia Universitato kun la nomo *Lesja Ukrainka* en la urbo Lucjk (Ukrainio). En la studplano por studentoj krom la franca, la hispana, la angla kaj la germana lingvoj,

estas speciala kurso pri interlingvistiko kaj nedeviga kurso de Esperanto. La publikaj prelegoj pri E-o novembre kaj decembre vekis la interesiĝon de studentoj kaj instruistoj.



Surfote: la membroj de la E-klubo „Arbara kanto” interparolas pri lingvaj kaj movadaj temoj kun la japana e-isto Yoichi Arai la 15an de decembro

La menciita katedro, kune kun la Katedro pri Aplikata Lingvistiko, por la 20-21-aj de septembro 2013 organizas la scian konferencon „*Interago de etnaj kaj planitaj lingvoj en la kunteksto de la Eŭropa integriĝo*”. Estas planitaj rondaj tabloj: „*Etnaj stereotipoj en internacia kaj interpopola komunikado*”, „*Funkciado de la internacia lingvo E-o kaj ĝiaj studoj*”. Laborlingvoj: la ukraina, rusa, belorusa, pola, angla, germana, franca, hispana kaj E-o. La materialoj de la konferenco estos publikigitaj en la faka scienca revuo de Orienteŭropa nacia universitato „*Naukovij Visnik*” („*Scienca Heroldo*”) antaŭ la komenco de la konferenco. Eblas prelegi sen publikigo de artikolo. Por interesiĝantoj mi sendos pli detalan informon (ankaŭ pri la konferenca temaro). Ni atendas vin en la urbo Lucjk, en pitoreska universitata ripozejo kaj esperas, ke vi subtenos la unuan katedron en Ukrainio, kiu okupiĝas pri interlingvistiko.

La aliĝilon (familia nomo, persona nomo, posteno, scienca grado, laborloko, en kiu lingvo vi prelegos kaj en kiuj lingvoj vi parolas, adreso, kontaktaj telefonnumeroj, retpoŝto, bezono de loĝloko) kaj la tekston de la

prelego bonvolu sendi ĝis la 1-a de marto 2013 al la adreso: *pr. Voli, 13, UA-43025 Lucjk, Ukrainio, Katedro pri Romanidaj Lingvoj kaj Interlingvistiko al DANYLYUK Nina. Labora tel.+38 (0332) 24-65-47, retpoŝto: nina_daniljuk@ukr.net; nina.danylyuk@gmail.com; poŝtel. +38 (067) 898-77-77; +38 (050) 858-75-77.*

Nina DANYLYUK

El la E-instruista mondo

Ekzamensesio en Senegalo

Inter la 29a de decembro 2012 kaj la unua de januaro 2013 okazis kurso kaj ekzamensesio en Rufisko, Senegalo. Tio estis la kvara agado de la Asocio „Scio Sen Bariloj”. Subtenis ĝin Esperanto Internacia kaj mecenato. Nia gastiganto estis la Nacia Centro por Lertigado kaj Agado (*Centre National de Formation et d’Action*) en Rufisko, tuj apud Dakaro. La afrikstila korto kun arboj kaj benkoj ebligis agrablajn paroladojn. La klimato en decembro tie ne estas aparte varma: proks 22 ĝis 25 gradoj. Do ni povis labori kaj kontaktiĝi en plej agrabla seka vetero. Ni povis observi multajn birdojn pro la apudeco de la oceano.

Malfermo: Feliĉa koincido: Sinjoro Meissa BEYE ĉeestis en Sofio ĉe Unesko en 1985! Li estas emerita eduka inspektoro kaj vicurbestro de Rufisko, Senegalo, kiu laboris ĉe Unesko de 1981 ĝis 1986. Sabate la 29an de decembro 2012 li partoprenis la solenan inaŭguron de la sesio en Rufisko, Senegalo, organizitan de Senegala E-Asocio, de „Scio Sen Bariloj” kaj gvidatan de Mireille GROSJEAN. Sinjoro BEYE klarigis, ke en 1985 li sekvis la diskutojn pri E-o kaj rilatis kun Tibor SEKELJ, kiu surloke agadis efike celante al akcepto de la Dua Unesko-rezolucio. Pro tio S-ro BEYE bonege konas E-on. Parolante pri E-o li nomis ĝin „ponto de espero kaj de humaneco” kaj „lingvo de lumo”.

Partoprenantoj: En la preparakunsido la sesan de decembro partoprenis pli ol 60 personoj. Pro financaj aspektoj ni devis anonci maksimuman nombron de 30 personoj. Aliĝis 32 al la kurso, kiuj formis tri sub-grupojn. La plej altnivela sub-grupo konsistis el la plej altnivelaj e-istoj en Senegalo, tiuj, kiuj kutimas instrui. La plej granda parto estis sub-grupo el lernantoj

de ili. En tiu grupo multaj eklernis E-on en la jaro 2012, tio estas, ke la okazigo de la kurso kaj sesio, decidita antaŭ unu jaro, multe stimulis la homojn en la lando. La tria sub-grupo estis interesatoj sen iaj scioj. Ĉar la kurso ne celis tutkomencantojn, ni estus devintaj rifuzi tiujn personojn. Sed tion ni ne faris. Ili kuraĝe sekvis la kurson kaj aliĝis al la ekzameno. Tamen ilia bezono estus la kurso Unua Kontakto. Sekve la instruisto Mirejo devis adapti sian instruadon al tiu situacio. Tio klarigas la rezultojn: la tutkomencantoj ne sukcesis en la ekzameno.

Partoprenis al la ekzameno 29 personoj: 10 personoj ne sukcesis en la skriba parto. La malsukcesintoj en ambaŭ partoj estis 3 kandidatoj inter la restantaj 19. Inter la sukcesintoj estis 11 kandidatoj kun mencio KONTENTIGE, 2 kandidatoj kun mencio BONE kaj 3 kandidatoj kun mencio TRE BONE. Tiuj tri personoj estas la instruistoj. Neniu atingis la maksimumon de 150 poentoj, tio signifas, ke nia elekto proponi sesion Unua Nivelo estis adekvata decido. Notindas la partopreno de 2 junulinoj ene de la 32-persona grupo.

Tutmonda Premio en Senegal: La Unua Nivelo ĵus adoptiĝis fare de la Komitato de ILEI. Ĝi ebligas akiron de atestilo por personoj kun bazaj konoj pri E-o. Sekvas ĝin la Dua Nivelo (antaŭa nomo: elementa) kaj Tria Nivelo (antaŭa nomo: meza). Tio validas ekde la 1-a de januaro 2013. Tiuj ekzamenoj estas MOVADAJ, ĉar ili entenas teston pri kulturaj kaj movadaj konoj.

Granda danko iru al la prezidanto de SEA s-ro Assane Faye kaj al liaj kolegoj, kiuj bonege organizis la tuton.

Mireille GROSJEAN

Inter la historio kaj la estonteco

En IPR 2012/3 (p. 32-34) ni raportis pri la ekruliĝo de du Comenius-projektoj. Pri la partoprenantaj lernejoj kaj ceteraj detaloj legu ankaŭ tie. Jen mallongigita raporto pri unu el tiuj projektoj (la plenan raporton legu en nia retpaĝo). – NdlR

En novembro 2012 en la lernejo „Canko Cerkovski” (Bulgario), okazis la unua laborrenkontiĝo kadre de la projekto „La diversaj profesioj – transformi la provokojn en eblon realigi siajn revojn”. La projekto estas financata per 20 000 eŭroj por ĉiu partoprenanta lernejo pere de programo

„Lernado dum la tuta vivo”, Comenius-partnereco inter la lernejoj. En nian urbeton Polski Trzemesz venis 52 lernantoj kaj instruistoj el Rumanio, Italio, Litovio kaj Germanio. Niaj specialaj gastoj estis Ermanno TARRACCHINI (Italio) kaj André DEMARQUE (Belgio).

La temo de la unua renkontiĝo estis „Inter la historio kaj la estonteco – rigardo al la historio kaj la ekonomio de la partneraj landoj”. Ĉiu lernejo preparis multteknikajn prezentadojn pri la temo „Historia kaj ekonomia disvolviĝo de la partneraj landoj inter la 1900a kaj 1989a jaroj”. La prezentadojn ni montris antaŭ ĉiuj partoprenantoj de la projekto, same antaŭ multaj lernantoj, instruistoj kaj gastoj, kiuj kun granda intereso partoprenis en la laboragadoj.

Ĉiuj gastantaj grupoj havis la taskon prezenti ankaŭ la gastigantan landon. La temo de la tasko estis „Bulgario antaŭ la lupeo de la partnera esplorado”. Ni vidis, ke la partneroj ne scias multe pri Bulgario. Kaj ofte okazis, ke tio, kion ili sciis, ne estas la vero. Ne estis tiel kun la gastoj de Rumanio, kiuj montris bonegajn konojn pri nia lando. La gelernantoj konkuris ankaŭ en kvizoj kun demandoj pri EU kaj la partoprenantaj landoj.



La sekva renkontiĝo estos inter la 21a kaj 28a de aprilo 2013 en Germanio.

Mariana GENCHEVA, kunordiganto de la projekto

La Panteono

La Panteono estas templo kun kupola tegmento en Romo, konstruigita de la imperiestro Hadriano sur loko, kie antaŭe staris samnoma templo konstruigita de Agripo en la jaro 27 antaŭ nia erao. Ekde la j. 609 la roma Panteono estas kristana preĝejo, nuntempe ankaŭ internacia tombejo. Laŭ la roma modelo estis konstruitaj alilandaj panteonoj, ekzemple en Parizo en 1764-90. Ili fariĝis konataj pro siaj arkitekturo kaj tomboj de la plej grandaj eminentuloj.

Ankaŭ e-istoj, almenaŭ la pedagogoj, havas sian Panteonon, lanĉitan kaj prizorgatan ene de la paĝaro *edukado.net*. Ĝi enhavas ne nur 66 eminentajn forpasintojn sed ankaŭ 47 aprezatajn vivantajn instruistojn. Ĉiujare la 15an

de decembro estas prezentataj tie ĉ. 15 vivantaj meritplenaj E-pedagogoj. En la jaro 2012 estis enpanteonigitaj 13 instruistoj el 12 landoj kun siaj fotoj kaj vivresumoj, kvin el ili estas el ekster Eŭropo. La plej juna naskiĝis en 1991 (Burundo) kaj la plej aĝa en 1932 (Vjetnamio). Ĉiuj havas siajn interesajn meritojn. Vidu la Panteonon ĉe www.edukado.net / *Biblioteko*, aŭ serĉu per la serĉilo de *edukado.net*.

La mirinda portalo *edukado.net* estis lanĉita en 2001 kaj celas helpi la laboron de instruantoj de E-o. La konstruon kaj redaktadon unue financis ESF (*Esperantic Studies Foundation*). La nuna, tria versio estis konstruita el subvencioj de la membraro. La paĝaron direktas la *Fondaĵo de edukado.net* kaj la redaktadon ankoraŭ nun financas ESF. La paĝaro havas 2700 membrojn. Sen la nemezurebla strebado kaj sindonemo de d-rino Katalin KOVÁTS *edukado.net* ne povus daŭre evolui kaj neniam atingus siajn celojn: provizi E-ujon per senpaga moderna kaj pliiĝanta instru-materialo, konsili, gvidi, trejni instruistojn rete (projekto RITE), okazigi ekzamenojn, ĉeeste kontribui al lingvokursoj, ebligi retan interinstruistan kunlaboron. Kiel *lernu.net* valoras al lernantoj, tiel *edukado.net* valoras al progresintoj kaj instruistoj. Mirinda estas i.a. ĝia biblioteko, enhavanta 500 senpagajn lernilojn detale prezentatajn, kiujn la vizitanto povas kvazaŭ enmanigi al si de sur breto. Impona estas ankaŭ la kolora vico de tradukoj de la lernolibro de Stano MARČEK, *Esperanto per la rekta metodo*, en trideko da lingvoj. Aldone al tio elŝuteblas ekzercoj, ideoj, testoj kaj eblas rete diskuti kun aliaj instruantoj. Se vi vizitas *edukado.net*, bonvolu ankaŭ ensaluti kaj danki. Kvankam la uzo estas senpaga, ĝi ne estas senkosta! Kaj *edukado.net* kaj *lernu.net* bezonas nian subtenon kaj ni nun varbu novulojn por profiti de ili. Antaŭ 10-20 jaroj tia helpo estis neimagebla.

Raita PYHÄLÄ (Finnlando)

Alparolas vin la nova vicsekretariino de ILEI

Kiam mi en septembro ekprilaboris la membroliston de ILEI, mi ne atendis, ke ĝi estos tiom defia tasko. Mi volas peti ĉiun, kiu anoncas adresan aŭ alian ŝanĝon, bv. uzi la adreson <ilei.oficejo@gmail.com>; tio atingas min, la membro-prizorgantinon. Se vi devas reklamacii pri miso, aldonu kopion al nia kasisto <ilei.kasisto@gmail.com>. Bonvolu skribi viajn familiajn nomojn per MAJUSKLOJ, por ke ni povu bone diferencigi personajn kaj

familiaj nomojn. Skribante al ni pri membro-aferoj, bv. uzi temlinion: M201X [Landnomo] [Via familia nomo]. Tio helpos al ni rapide trovi viajn mesaĝojn en nia superŝutata oficeja retkesto. Ni promesas reagi rapide al viaj mesaĝoj, por ke vi vidu, ke ili estas traktataj.



Pli ol 85% el niaj membroj aliĝas tra sekcioj. Ni ĵus sendis al ili Gvidilon pri la Anoncado de Membroj, por ke ankaŭ ili helpu al ni efike registri la membraron. Legu niajn diversajn gvidilojn ĉe www.ilei.info ĉe 'Dokumentoj > Gvidiloj'. Mi sendos al sekiestroj pli ampleksan version de ĉi tiu teksto. Ni planas disponigi tabelojn kun la membraro de la antaŭa jaro, por ke ili facile aktualigu la informojn, tiel ke ni povos efike aldoni ilin al nia mastrolisto.

Por la anoncado de individuaj membroj, ni pretigis kaj nun testas retan aliĝilon en la ankoraŭ konstruata mult-lingva retejo <ilei-mondo.info>, kiu aŭtomate zorgos, ke ni ricevu ĉiujn necesajn informojn.

Ĉiu membro ricevas nian organon IPR. Membroj, kiuj elektis ricevi la paperan version de IPR rajtas peti ricevi aliron ankaŭ al ĝia reta versio. Sekciestroj ĉiuokaze ricevas tion, por ke ili povu enlande trakti reklamaciojn, sen la neceso aliri nin internacie.

Reage al pledo en la forumo en Kunmingo, la komitato retvoĉdone akceptis la enkondukon de C-landoj por membriĝo, kaj poste la liston de 79 landoj kun plej limigita pagipovo. Tiu listo legeblas en nia retejo www.ilei.info en la paĝo 'Kiel membriĝi al ILEI', alirebla rekte el la enirpaĝo.

Praktike, tio starigas novan principon: ĉiu membro ja pagas ion. Nur, ke en la C-landoj la postulata sumo rilatas juste kun la averaĝa nacia pago-kapablo. Jen la membrokotiza tabelo:

Membreco	Presita IPR	Reta IPR
A-landoj	€ 20	€ 10
B-landoj	€ 10	€ 5
C-landoj*	€ 2	€ 1

* La nombro de C-landaj abonoj estas limigita. ILEI uzos la Koleg-helpan Kason (KhK) por levi la C-landan sumon ĝis la B-landa. Ni akceptos C-landajn membrecojn, nur dum tiu kaso havas sufiĉajn rimedojn por tio. Donacoj bonvenas!

Ni nun (januarfine) kontaktas la sekciojn en C-landoj, por ke ili proponu la subtenotajn membrojn por 2013. Ni atendas, ke koleghelpkase subtenitaj membroj aŭ sekcioj el la antaŭa jaro raportu pri sia agado kaj petu daŭrigon por 2013. La estraro (laŭregulare) fiksas meze de februaro la ĉefan grupon de KhK-subtenoj por 2013. Revuofine vi trovos plenajn informojn kiel pagi monsumojn al ILEI, ĉu por membreco, konferenco, *Juna amiko* aŭ aliaj celoj. Ĉiam aldonu adekvatajn klarigojn, plej sekure sendu mesaĝon pri la pago kaj ĝia celo al <ilei.kasisto@gmail.com>.

Ni rezistas akcepti nurajn abonojn por IPR; la vojo al IPR estas tra membreco en ILEI. La abono ekzistas ĉefe por bibliotekoj kaj instancoj. La estraro novembre altigis la koston de abonoj ĝis € 24. Ĉe perataj abonoj, ni ja devas doni makleraĵon de 20%. La kapablo de nia Ligo antaŭenigi la instruadon de E-o ege dependas de kresko de la membro-nombro, ĉar tio enportas la plimulton de la rimedoj por nia agado. Do, nepre nun remembriĝu por 2013, kaj konvinku aliajn pri la meritoj de nia Ligo!

Karaj legantoj, dankon por via tempo, kiun vi dediĉis al tiuj ĉi miaj linioj. Mi deziras al vi, ke vi en nia revuo trovu multajn interesajn informojn kaj instigon por via porinstruista kaj poresperanta agado!

Fejfi, la ILEI-vicsekretario.

46a ILEI-konferenco

12-18 julio 2013 en Sieber ĉe Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo

La unua, plej favora aliĝperiodo finiĝos la 31-an de marto 2013.

**Abunda programo por ĉiuj aĝgrupoj!
Malaltaj kotizoj, favoraj tranoktebloj, famaj prelegantoj!**

El la faka programo por ĉiuj:

1. Fakprelegoj pri lingvo, lingvoinstruado, aktualaj kaj sukcesaj instru-metodoj, instruado kaj moderna teknologio.



2. Internaciaj projektoj, subvenciebloj (**Comenius, Grundtvig** ktp).
Prezentado de sukcesaj projektoj, praktika lernado pri ellaborado, manaĝado de projektoj.
3. Ekzamenoj: ĝenerala trarigardo, laborgrupo por evoluigi la enhavon por la A1-A2-nivelaj ekzamenoj (gvidos: **Rudolf Fischer**).

Por studemuloj

1. Trejnsesio por instrukapabligo (super la konataj Flugiloj-seminarioj).
Kelktaga, intensa fakseminario kun **Katalin Kováts** (*edukado.net*).
2. Observado kaj analizado de modellecionoj, instrumaterialoj, helpiloj.
3. Spertinterŝanĝo, diskutrondoj, instruista bazaro.

Por lernantoj

Novajo! **ILEI-lernejo** (por ĉ. 12-18-jaruloj), kadre de SALO 8 (Somera Arbara Lernejo) somera feriumado, kunlernado de ĝemelurbaj junuloj el Herzberg (DE) kaj Góra (PL).

Ekzamenoj

Dum la konferenco eluzu la bonŝancon, ke eblos trapasi la UEA/ITK-KER-ekzamenojn en la B2- kaj C1-niveloj. Bonvolu aliĝi ĝustatempe (ĝis fino de junio!) ĉe *edukado.net*. Por la preparado ni rekomendas la libron kun modeltestoj *De nivelo al nivelo*. Mendu ĝin de Zsófia Kóródy, LKK.

Ekskursoj

1. **Goslar** [*vd la foton kovrile*] estos vizitata dum busekskurso tra la Harz-montaro. La urbo estas perlo de la regiono, historia urbo en la Unesko-listo de mondkulturaj heredaĵoj. Vizitindas la impona konstruaĵo „Kaiserpfalz”, la iama sidejo, palaco imperiestra. Allogas turistojn la belega urbodomo, la muzeoj, la ĉefplaco kun puto, sonorilludo, kafejoj, bierejoj.
2. **Göttingen**: ĝi estas la eta grandurbo en la suda parto de Malsupra Saksio. Ĝis 1936 en Göttingen estis la plej fama universitato en la mondo. Multaj famuloj, ekz. Heinrich Heine, studis tie. Granda nombro de Nobel-premiitoj hejmis ĉi tie. La urbo estas pitoreska, ĉar ĝi ne estis tro bombardita dum la dua mondmilito. La historia urbodomo kaj Gänselesel (Ansera Linjo) estas nepre vizitindaj.
3. **Hannover** estas la ĉefurbo de la federacia lando Niedersachsen (Malsupra Saksio). La historia urbodomo kaj la operejo estas pompaj konstruaĵoj. En la urbocentro troviĝas multaj konataj magazenoj. La zoologia ĝardeno de Hannover estas unu el la plej belaj en Eŭropo. La

urborigardado enhavos vizitojn de la plej vidindaj konstruaĵoj, muzeoj kaj parkoj.

Manĝoj

La ofertoj estos variaj kaj por vegetaranoj kaj por ĉiomangantoj. Eventualajn specialajn diet-bezonojn bv. menciigi sur la aliĝilo. La matenmanĝa bufedo (5-6 EUR) en la konferenĉhoteloj estos akirebla ankaŭ por tranoktintoj en feriodomoj. Por tagmanĝo estos preparataj malmultekostaj pladoj servotaj rekte en la konferenĉejo. Vespermanĝoj estos individue mendeblaj laŭmenue por ĉ. 5-15 EUR.

Internacia balo: ĝi estos verŝajne neforgesebla pro la abunda festmanĝo kun specialaĵoj, frandaĵoj, trinkaĵoj, granda gastamo de la restoracio de la esperantista familia hotelo Zum Pass, pro la planata muzika vespero kun programo, dancado, surprizoj! Prezento kaj gustumado de germanaj vinoj. Tutnokta amuziĝo garantiata!

Detaloj, informoj, aliĝo, kontakto: <http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de>
Bonvenon! Nomo de LKK: Zsófia Kóródy, prezidanto de AGEI, vicprezidanto de ILEI

PEKA PREZENTO:

**PEDAGOGIA
KALENDARO**



Tutjare: Reta Instruista Trejnado (RITE). Inf. <<http://edukado.net/klerigejo/1>>

Mar 04-08: Intensa kursaro kun metodika observado, kuninstruado (Herzberg, DE)
Inf: <zsosfia.korody@gmail.com> – por ĉio en Germanio (DE)

Mar 08-09: Studsemajnfino: efika retlernado, KER-preparoj (K. Kováts, Antverpeno, BE). Inf: <iwona.kocieba@telenet.be> kaj <http://edukado.net/kursejo>

Mar 25-31: Printempa Semajno Internacia: kursoj, trejnsesioj (St. Andreasberg, DE)

Apr 06-08: Movadaj ekzamenoj de ILEI/UEA; tri niveloj (Bogor, Indonezio).

Inf: <mirejo.mireille@gmail.com> por ĉiuj ekzamenoj de ILEI/UEA.

Apr 15-20: Lingvokursoj je unua kaj duagrada niveloj. (Kvinpetalo, Bouresse, FR)
<<http://kvinpetalo.org>>

Apr 20-21: Movadaj ekzamenoj de ILEI/UEA; tri niveloj (Barcelono, Katalunio)

- Apr 20-27:** Kurso de **ILEI** kun KER-ekzamenoj (Apr 26-28: B1, B2, C1 skribe /parole) Kulturcentro Grésillon, FR. Gvidantoj: C. Chazarein, S. MacGill (lia kurslibro *Nemave Edifi*, FEL, 2007, €19,90). Inf: <http://gresillon.org>.
- Apr 22-26:** Kurso pri altnivela tradukado kaj preparado al atesto pri supera lernado. Gvidas. Brian Moon. Kvinpetalo.
- Maj 03-05:** 46-a Esperanto-Seminario, Minamiečizen, provinco Fukui, JP
Inf: <<http://www.jei.or.jp/evento/2013/index.htm#2013ES>>
- Maj 09-10:** 9-sesia seminario pri la fervoja versio de kurso e125. Bordeaux-Artigues, FR, en la 65a Kongreso de IFEF (majo 4-11). Gvidanto: Stefan MacGill. Inf: <<http://ifef-ufe-2013.over-blog.fr>>. Samloke Franca Kongreso (majo 8-11), kun KER-ekzamenoj.
Inf: <<http://esperanto-france.org/congres-national-2013>>
- Maj 09-12:** 59a Studmodulo: fakprelegoj, metodiko (Herzberg am Harz, DE)
- Maj 17-20:** Germana E.-Kongreso: B1, B2, C1 KER-ekzamenoj skribe kaj parole, Jarčekunveno de nia germana sekcio (Nürnberg, DE)
- Jun 25- jul 5:** Nordamerika Somera Kursaro de Eo (NASK), Tri niveloj (Raleigh, NC, US). Inf: <<http://esperanto.org/nask/>> kaj <eddyellen@aol.com>
- Jul 05-08:** Nacia Kongreso de ELNA okazas samloke kiel NASK.
- Jul 05-12:** Internacia Esperanto-Kursaro (Herzberg/Sieber, DE)
- Jul 08-12:** Somera E-kurso, Orviesi, Finnlando (vidu paĝon 25).
- Jul 12-18:** **46a KONFERENCO de ILEI kun SALO kaj KER-ekzamenoj** (vd p. 36)
- Jul 12-20:** Somera E-Studado, plurnivela kursaro kaj renkontiĝejo, i.a. por anoj de lernu.net. (Martin, SK) <http://ses.ikso.net>
- Jul 20-27:** 98a UK kun Tago de la Lernejo, ILEI-kunsido k.m.a. (Rejkjaviko, IS)
- Aug 02-10:** 40-hora trejnkurso por E-instruantoj, subvenciata de EU/Grundtvig. Gvid. K. Kováts/ S. Lelarge. (San Remo, IT, kadre de la Itala Kongreso). Organizas Itala Esperanto-Federacio (IEF) kaj Kosmo.
Inf: <trejnado-kastelaro@kosmo.eu.com> kaj <<http://edukado.net/kursejo>>
- Sep 14-24:** Metodika Seminario, UAM, Poznano, PL. Gvidas K. Kováts. – alirebla ankaŭ de ne-universitatanoj. Inf: <www.edukado.net>. Krome, atendeblas lanĉo de unujara plejparte koresponda programo de instruista trejnado.
- Sep 20-22** 60a Studmodulo: fakprelegoj, tradukado, terminologio (Herzberg, DE)
- Okt 5:** Monda Tago de Instruistoj, proklamita de Unesko; multlande festinda.
- Okt 16-20:** la 2-a Internacia Esperanto-Lernejo por komencantoj kaj progresintoj, Kastelo Bartošovice, CZ; informoj en <http://verdstacio.wix.com/lernejo>
- Dec 20-22:** 61a Studmodulo: fakprelegoj, literaturo, lingvistiko (Herzberg, DE)
- Dec 29-Jan 4:** Movadaj ekzamenoj de ILEI/UEA. 3 niveloj dum la 5a Afrika Kongreso de Esperanto en Kotonuo, Benino.

PEKA aperos en nia retejo kun pli da detaloj kaj kreskeblo. Vidu ankaŭ kalendarojn de UEA, Eventoj, edukado.net kaj multaj aliaj.

Agrablan elektadon tra la jaro!

Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Mireille Grosjean (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Karine Arakelian (sekretario, arkivisto), Leysester Miro, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Tiekko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis.

Kontrolo: Ulla Luin, Simon Smits, Rudi Koot.

Lerneja: Julián Hernández (gvid.), Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tiekko Isikawa, Marija Jerković, Luigia Madella, Jacqueline Poux, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas (Estrare: Stefan MacGill).

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny (Estrare: *vakas*).

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Aida Čížikaitė, Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat.

Kunlaborantaj institucioj

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi.

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Viŝazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net.
Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.
Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49)55215983, Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono:
Zsófia Kóródy, zsafia.korody@esperanto.de.

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Bharat Ghimire**.

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidélusz**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto kaj A-komitatano de ILEI ĉe UEA: **Stefan MacGill**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**.

UN (Unuiĝintaj Nacioj): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek**, **Ron Glossop**, **Leysester Miro**.

UNESKO (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, 72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr; **Monique Arnaud**, Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Courmon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

Membreco kaj pagado por aliaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por *Juna amiko*. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al Vilĵo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. [<ilei.kasisto@gmail.com>](mailto:ilei.kasisto@gmail.com).

La pagoj povas okazi pere de la nederlanda ILEI-konto, al la ILEI-konto ĉe UEA aŭ al la sveda konto:

* Pagoj al la nederlanda konto de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bv. aldoni € 5 por la nederlandaj bankkostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo).

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku viajn nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (*Juna amiko*), pike-b (projekto *Interkulturo*).

* Pagoj al la sveda bankkonto: En Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank.

El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT-kodo SWEDSESS.

Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 20 €. Reklamtarifoj por IPR: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Hejmpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado:** Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktejo:** NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, <jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <moerbeekr@gmail.com>.

La nunan numeron ni sendis al la presejo la 31-an de januaro 2013, redaktfino por la sekva numero: la 15-an de aprilo 2013.

SEKCIOJ DE ILEI

Albanio: (*provizore*) Bardhyl SELIMI, Rruga Fortuzi, nd.9, h.1, ap. 3, AL-1016 Tirana, selimibardhyl@yahoo.com

Aŭstralio: Jennifer BISHOP, 24/8 Wallen Rd, Hawthorn, AU-3122 Victoria, bishop.jennifer699@gmail.com

Belgio: Marc CUFFEZ, Elisabeth-laan 295, BE-8400 Oostende, marc.cuffez@telenet.be

Benino: ALOFA Jérôme Charles, 04BP0672 Cotonou, Rep du Benin, alofkarlo@yahoo.fr

Brazilo: Leysester MIRÓ, rua Jorge Tiburcia 592, Vila Mariana, BR-041-26001 Sao Paulo (SP), leysester@gmail.com

Burundo: Jérémie SABYUMVA, BP 170, Rumonge-Burundi, ane_bur@yahoo.fr

Ĉeĥio: Jana MELICHÁR-KOVÁ, Polní 938, CZ-696 02 Ratiškovice, melicharkova@quick.cz

Ĉinio: GONG Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031

Nanchang, arko.gong@qq.com

Danio: Bent JENSENIUS Højstrupvej 124, DK-2700 Brønshøj, bentjensenius@gmail.com

Finnlando: Sylvia HÄMÄLÄINEN, F.E. Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere, sylvia.h@kolumbus.fi

SEKCIOJ DE ILEI

(daŭrigo)

Francio: Michel DECHY,
65 allée de la Crémaillère,
FR-59650 Villeneuve d'Ascq,
michel_dechy@hotmail.com

Germanio: Zsófia KÖRÖDY,
E-Centro, Grubenhagenstr. 6,
DE-37412 Herzberg/Harz,
zsofia.korody@esperanto.de

Hungario: József NÉMETH,
Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász,
jozeuf.nemeth@gmail.com

Italio: Luigia OBERRAUCH
MADELLA, via Prampolini 8,
IT-43122 Parma,
silkovojo@aliceposta.it

Japanio: ISIKAWA Tiego,
Tate 1-6-6-103, JP-353-0006
Siki-si, Saitama-ken,
isksanjo@ff.e-mansion.com

Katalunio: Pedro M. MARTÍN,
Arnau Gatell 2, ES-17300 Blanes,
ileicat@hotmail.com

Korea Resp.: LEE Jung-kee,
Moklyun Usong Apt. 307-707,
Bomke-dong, Dongan-ku, Amyang-
si, Kyungki-do, KR-431-070,
esperanto@saluton.net

Kroatio/KEL: Marija JERKOVIC,
Jarunska 6, HR-10000 Zagreb,
mjerkovic@net.hr

Kroatio/KEU: Ivan BEKAVAC-
BASIĆ, Kušlanova 59, HR-10000
Zagreb, *ilei@hes-keu.hr*

Kubo: Marta ALONSO
GUTIÉRREZ, Kuba E-Asocio,
Apartado 5120, CU-10500 La
Habana, Cuba,
info@esperanto.co.cu

Meksiko: Carlos HERNÁNDEZ
LOARCA, Arco del Triunfo 2019-40
San Pedrito los Arcos, MX-76148
Querétaro México, *ilei@esperanto-
mexico.org*

Mongolio: Khorloo Tserende-
jid, Ulanbatoro, distrikto BZD, 82-
5, *tserendjd@yahoo.com*

Nederlando: Robert MOERBEEK,
Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE
Beverwijk, *moerbeek@gmail.com*

Nepalo: Bharat Kumar GHIMIRE,
Nepala E-Asocio, G.P.O. Box
10518, Kathmandu,
nespa_bharat@hotmail.com

Norvegio: Anne Karin BONDHUS,
Morenefarefaret 8A, NO-4340 Bryne,
akbondhus@jkn.no

Pollando: Tomasz CHMIELIK, ul.
Jarzębinowa 3/33, PL-21-040
Świdnik, *tchmj@wp.pl*

Rumanio: Mihai TRIFOI,
Str. Principală, Bl.1 Ap.3,
RO-527116 Bixad/Jud. Covasna,
mihaitrifoi@yahoo.com

Serbio: Radojica PETROVIĆ,
Bul. oslobođenja 36,
RS-32000 Čačak,
radojica.petrovic.rs@gmail.com

Svedio: Agneta EMANUELSSON,
Carl Ugglas väg 6, SE-641 37
Katrineholm,
agneta.emanuelsson@fro.se

Svislando: Mireille GROSJEAN,
Grand-rue 9. Case postale 9,
CH-2416 Les Brenets,
mirejo.mireille@gmail.com

Togolando: ATTIOGBE-AGBEMA-
DON B., Mensah, B.P. 39, Aneho,
Lome-TOGO,
abiovamensah@yahoo.fr

Ukrainio: Volodimir
HORDIENKO, p/k35, Kijiv-133,
UA-01133 *volodomir@ukr.net*

Usono kaj Kanado: Ronald
GLOSSOP, 8894 Berkay Avenue,
US-63136-5004 Jennings, MO
rglossop@mindspring.com

Vjetnamio: Ngyuyen THI NEP,
70, B20A, Kim Lien, Dong Ha,
Hanoi, *Ngyuynepa9cfl@gmail.com*

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida ELBAKIAN,
Moldovakan 26/2, kv.52, AM-
375062 Erevan, *Lidaelb@yahoo.com*

Barato/Hinda Unio: Venkatesh
REDDY, No. 216, Off Main Road,
Whitefield, Bangalore 66,
Karnataka, *esperovr@yahoo.co.in*

Britio: Elizabeth STANLEY,
Frome House, Frome Gardens,
Stroud, Glos. GL5 4LE,
elistaros@hotmail.com

Bulgario: Mariana GENCHEVA,
Targovska 95, BG-5180 Polski
Trambesh, *maries972@yahoo.com*

Ĉilio: Héctor CAMPOS GREZ,
Casilla 903, CL-3340000 Curico,
hecg@uea.org

Ganao: Alfred Kobina ARTHUR,
P.O. Box TS 404, Teshie Accra,
abaako43@yahoo.com

Islando: Loftur MELBERG
Sigurjónsson, Traðarberg 13,
IS-221 Hafnarfjörður,
lofturmsig@yahoo.de

Israelo: Gian Piero SAVIO,
13/4 Menora-str. IL-53490
Givatajim, *saviogp@zahav.net.il*

Kongo DR: Viktor LUKOLAMA
LUFIMPU, c/o Mampuya Diakiese,
B.P. 7598, CILU, Kinshasa 1,
kekcd@yahoo.fr

Nov-Zelando: Gwenda SUTTON,
12C Herbert Gardens, 186 The
Terrace, NZ-6001 Wellington 1,
gwenda.s@ihug.co.nz

Pakistano: Adeel Mahmood
BUTT, Ward No. 11, near M.C.
High School, PK-39100 Nankana
Sahib, *adeelbutt84@gmail.com*

KONTAKTPERSONOJ

Bolivio: Leandra DIA RIOS, Calle
Maria Estiváriz No 290, Avenida
Coronel Valdez Pasaje Zaratustra,
Villa Pabón, Zona Central,
mileis_7@hotmail.com

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta
KULENOVIĆ, Branica Sarajevo
15/V, BA-71000 Sarajevo

Estonio: Helgi HROMOVA,
Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Haitio: Christine THEANO,
Christ-Roi, Imp. Romane # 41,
HT-6110 Port-au-Prince,
christinethano@hotmail.com

Indonezio: Ilia Sumiltia DEWI,
Perumahan, Pejuang, Pratama,
Blok L, no. 11, RT/RW 003/006,
Bekasi, Jawa Barat,
ilia.dewi@gmail.com

Kenjo: Gilbert S. SIKALA,
Chemomi Estate, P.O. Box 22,
30301, Nandi Hills,
simiyugilbert@yahoo.com

Kostariko: Hugo MORA
Poltronieri, Apartado 4981,
CR-1000 San José,
tikoguau@gmail.com

Litovio: vakas

Urugvajo: Sonia RISSO, Pascual
Costa 3253 Apto 1215, UY-11700
Montevideo, *sonry@adinet.com.uy*



Assane Faye, prezidanto de SEA (vd „Ekzamensesio en Senegal” p. 31)



Kun diplomoj (de maldekstre): Lafi Charles Diatta, Antoine Gomis, Assane Faye

